

Alicja Lewanderska (Krejči) Quednaŭ PL /DE

POLITOLOGIO- SCIENCO PRI POLITIKO

kaj

KULTURPOLITIKO

(POLITIKO DE KULTURO)



# ENKONDUKO EN SCIENCON PRI TEORIO DE SCIO

kaj

## PRIPAROLADO DE TEORIO PRI POLITIKO

*(Elektitaj bazaj informoj por AIS–studentoj kaj taŭgaj por aliaj altlernejoj kaj postmaturaj studadoj)*

KURSO EN S-2 AIS SM

DEVIGA ENKONDUKO POR TIUJ, KIUJ VOLAS STUDI EŬROLOGION KAJ  
ĴURNALISTIKON - VALIDAS 2 STU

RECENZENTOJ . Franciszek Ziemiński (Pol. Śląska kaj Śląski Uniwersytet

Bronisław Miszewski- Politechnika Śląska- Gliwice

Helmar G. Frank AIS SM, Univ. Paderborn

Marian Jedryczko- Politechnika Śląska-Gliwice

Lingva kontrolo.

Danuta Stawecka- COM-Gliwice

Stanisław- Krejci-Lewanderski

Hans-Dietrich Quednau

Frieder Weigold

Irena Winnicka

Daniela Emler

Grafika kaj komputila prilaborado: Ewa Bogacińska

Piotr Hawrylewicz

Katarzyna Hawrylewicz

Kursoj de periodo 1993-2008 en AIS SM

kaj de 1972-2005 en Śląska Akademia Medyczna (Analityka Medyczna)

Instytut Nauk Społecznych - Politechnika Śl Gliwice

Kiam oni invitis min fari kursojn pri eŭrologio en AIS kaj pri eŭrologistiko en niaj postkomunismaj landoj, mi tre ekĝois, ke finfine ankaŭ en universitataj rondoj estas loko por tre grava kaj aktuala problemoj. Krome se problemoj aŭ novaj faktoj aperas, tio signifas, ke ne nur bezonata estas diskuto inter popoloj kaj inter politikistoj ĉu ĵurnalistoj. De praktika kampo oni devas iri al scienco, kaj teorie pripensi kaj eĉ hipotezi (provi prijuĝi) diversajn povfaktorojn.

Do antaŭe mi patoprenis kelkajn prelegojn de fakuloj (politikistoj kaj sciencistoj), tra legis diversajn, ofte tro kontroversiajn materialojn, sed fine mi pensis pri studentoj.

Tiamaniere aperis la ideo pritaksi ilin kaj ilian scienc-scion kaj politikajn emociajn engaĝiĝon, poste mi provis provizore pritaksi ilian politikan ekkonon, provis kompari diversajn grupojn de studentoj el diversaj landoj, kaj provis de tio ekhavi konkludojn.

De komparaj konkludoj nun mi certe opinias, ke komence ĉiuj bezonas la teoriajn enkondukojn al politologiaj, filozofiaj, sociologiaj, psikologiaj kaj historiaj scioj, pricertigon, ripetadon ktp de teoriaj sciencaj terminaroj, por havi la komunan sciencon nivelon.

Tio estas laŭ mi la unua necesa ŝtupo. Mi kuraĝas diri, ke kun politiko simile estas kiel kun matematiko: sen bazo oni ne plu progresos kaj ne plu komprenos. En tiu loko mi samtempe respondis al kelkaj homoj, ankaŭ al miaj gekolegoj – ke laŭ mi la politika scio – estas scienco, nu, precize estas scio pri politiko (laŭ la anglo-pola skolo).

Nun daŭrigante, poste mi opinias, ke por fari la kurson pri problemoj de Eŭropo kaj pri teoria postulo, ke oni devas ebligi krei la modelon de komuna agado kaj kunvivo oni devas ankaŭ provi eduki la homojn en nova vivmodelo. Tia komenco estas deviga kaj necesa, sen tio oni nenian enkondukos homojn en komunan vivadon en Komuna Eŭropo.

Sekvonta afero – aŭ ŝtupo – estas kreado de sincera diskutrondo, konstati ĉu ekzistas aŭ ne internacia aŭ ŝtata vivkultura kunagado kaj kono de politikaj fenomenoj. Studentoj devas ekkoni, kompreni kaj eĉ kompari la faktojn, pritaksi ilin kaj kapabli fari konkludojn. Lekciisto – docento havas taskon montri al ili kaj proksimigi la eblecon vivi en grupo etne ofte diferenca konkorde kaj pace.

Tia kompreno estas necesa por krei la t.n. „kulturon de politiko” aŭ tion, kiu nun estas ofte diskutrondaj temoj inter ekz. polaj sciencistoj, politikistoj kaj eĉ inter popolo mem, "la politikan deziron", la politikan povon, volon ktp.

Tio certe ne estas facila, sed kiam venos scio, aperos pluaj eblecoj por kompreno kaj senagresa kunvivado, kaj tio estas aŭ povintus esti la tuta agado de ni kaj niaj politikistoj, kiuj respondecas pri ni, ĉar de niaj voĉoj ili eniris post la baloto al direktado – ne al regado, kiel erare ofte oni pensas.

Ofte aperas la terminoj „politiko” kaj „politikaj faktoj”, kiuj estonte fariĝos la historiaj faktoj kaj fenomenoj, iu pri ili respondecas, iuj grupoj direktante kreas ilin, provokas aŭ respondecas ne ebligante bremsi diversajn procezojn, i.a. terorismoj, naciismoj, malamikecristoj.

Kia Eŭropo? Ne sufiĉas diri: komuna. Ekzistis jam kelkaj komunumoj, kaj ili laste disfalis, pli aŭ malpli pace. Ĉu evidentiĝis, ke homoj ne kapablis vivi konkorde? Ĉu ili estis ne bone edukitaj, nematuraj?

La grupo de polaj politikistoj kun A. Kwaśniewski kaj grupo de Polonia – postulas ke oni semu la ideon pri Eŭropo – patrujo de patrolandoj ktp. Estas diversaj proponoj, grave ke estu sen „hiperismo”.

Laŭ PIV-o „**politiko**” estas: scienco aŭ arto de regado de ŝtato.

- „**ŝtato**” – politika formo de organizita socio en limdifinita teorio, kies registraro havas super la tiea loĝantaro regantan, leĝodonon, jurisdikcian kaj administracian povon,
- „**socio**” – tuto da homoj, kunvivantaj pro komunaj interesoj kaj havantaj komunajn kutimojn kaj leĝojn,
- „**fakto**” – io, kion oni scias reale ekzistinta aŭ ekzistanta,
- „**konflikto**” – malkonsento, kaŭzita de kontraŭeco de deziroj kaj opinioj.

Politikaj faktoj estas kreitaj surbaze de aktualaj bezonoj, tamen oni devas ĉiam memori, ke dum miloj da jaroj oni povas konstrui ilin uzante la fortojn kiujn havas popoloj kaj grupoj, direktante ilin bone aŭ ne laŭ propraj celoj. La historie epoka verko de fama pola etnologo kaj sociologo, prof K. Dobrowolski, lernanto de L. Malinowski, kiu venis de angla scienca skolo (la teorio de procezoj spontanaj) ciam estas aktuala kaj povtus esti deviga kaj por studentoj kaj sciencistoj kaj por politikistoj kun la ĉefoj de partioj kaj la t.n. (kvankam estas ignorataj) „prem-grupoj” (biznesmanoj, gangoj ktp).

La terminojn „kulturo” kaj „politiko” mi detale prilaboris en alia materialo. Nun mi skize deziras diri iomete pri „politiko” mem kaj pri „teorio de politiko”.

Dum dekjaraj renkontiĝoj kun studentoj de AIS kaj pli frue dum laboro en diversaj institutoj en Pollando, Rusio, Germanio, Svislando, Bulgario ofte aperadis akraj disputoj, mi notis la ĉefajn problemojn kaj oni povas ilin listigi. Dum renkontiĝoj ĉu seminarioj aperis ankaŭ karakterizaj demandoj ĉu duboj:

- 1) Kio stiras ekkonon?
- 2) Ĉu scienca metodo de sociaj sciencoj diferenciĝas el metodo de natursciencoj?
- 3) Ĉu estas ebla en scienco objektiveco de ekkono?
- 4) Ĉu en sociaj sciencoj pli ĝusta estas ekkono indukta ĉu dedukta?
- 5) Kian rolon en ekkono ludas valoroj?
- 6) Ĉu vera en scienco estas tio, kio estas konsenta kun faktoj?
- 7) Ĉu ĝuste estas redukti ekkonon de socia vivo ĝis unu el sciencaj disciplinoj?

- 8) Se estas nebla racionala pravigo de teorio, kiamaniere oni povas konstati, kiuj el ili estas veraj kaj kiuj ne?

Tiuj jes estas la tezoj por komuna diskuto, kaj speciale ne por ĉiuj mi mem prezentos opinion por lasi la eblecon por aliaj mem krei kaj pritaksi la politikajn faktojn kaj politikajn opiniojn, modeligi komune la politikan kulturon.

### **1) Ofte oni demandas: kio stiras ekkonon? Do, kiam aperas ĉu komenciĝas la ekkono ?**

Ekkono komenciĝas de problemoj.

Nur tio, kio aperas en realeco, kiel *konfronto de elementoj de scio kun nescio* povas vekti precipan specon de necerteco, kiu estas bazo de malkaŝo de problemoj.

Problemo estas tiam, kiam ni ion scias kaj ion ne scias. Solvo de problemoj konsistas en enkonduko en nian ĝisnunan scion – novan informon, kiu kompletigos malkaŝitan nescion. Problemo ne estas ordinara demando, ĝi estas demando de precipa speco, demando vekanta pasion inventeman.

Oni povas diri laŭ Popper – ĉiu problemoj estas demando, sed ne ĉiu demando estas problemoj. Problemo ne estas demando, je kiu respondo estas evidenta – tiu – ĉi neevidenteco de respondo instigas al serĉado.

Resumante: ekkono ne komenciĝas do de faktoj, sed de problemoj.

### **2) Nun ni venu al alia problemoj, temas pri objektivado. Objektivado ekzistas, tamen ĉu estas ebla en scienco objektivado de ekkono?**

Se ekkono komenciĝas de problemoj, ĝi komenciĝas ankaŭ de speco de elirpunkto, kiu konstituas nian ĝisnunan scion. Nia ĝisnuna scio estas provizo de informoj, kiuj devenas de unu flanko, de tio, kio ligiĝas kun scio eksterfonta kaj kio en certaj sferoj enŝovas scion fontan.

Homo deduktanta el ekkono el difinita scio, havas lige kun tio certan provizon de direktivoj ordonantaj al li ekkonon en difinitan direkton. Provizo de direktivoj enhavas en si ankaŭ difinitajn sistemojn de valoro, el kiuj ĉiu ligiĝas kun specifa modelo valoriga. Karl Raymond Popper opinias, ke ne ekzistas observado senpasia, ĉiam observado estas el difinita punkto de scio, kaj ĝi enhavas valorojn. Se estas iu pli granda konscio pri difinitaj sistemoj de valoro, kiu enhavas konkretan vidpunkton, des pli certa estas irado al ekkono.

Max Weber asertis: ne estas en agado de homo konduto senca, se akompanas ĝin valoroj. Ĉiam agadon de homo akompanas valoroj. Se vi volas ekkoni agadon de homo kaj klarigi ĝin, vi devas ekkoni sistemojn de valoroj, kiuj akompanas lian agadon. Ĉiu agado estas konsciigo pri ŝanco atingi celon, sed tiu celo kaj tiu ŝanco konstruiĝas surbaze de certa scio, de certa sistemo de valoroj kaj de certa emocia stato. Senkonsidere je tio, ĉu oni havas scion veran ĉu falsan, surbaze de tio, kion oni konsideras grava, oni formas difinitan sintenon, bazinte al emocia engaĝiĝo; por aŭ kontraŭ. Popper indikas, ke oni ne povas eviti kaj valorojn kaj engaĝiĝon dum ekkono. Bazo de ekkona testo estas testo

empiria. Senpera metodo, kiun proponas Popper, kun tio ligita, estas metodo de falsigado. Metodo de falsigado konsistas en rekono, ke kvankam ni penas (celas) enkonduki novan informon en interesigantaj nin aferoj, ni neniam povas esti ĝis fino konvinkitaj, ĉu tiu nova informo, al kiu ni alvenis, estas informo vera tial, ke ni ne povas konfirmi kun certeco, ke efiko de nia ekkono estas vera, ĉar ne estas en socia realeco modelo de vero – se ĝi ne estas tiam tio, al kio ni venos, en tiu momento povas esti vero probabla. Ni povas proksimiĝi al vero, kiel montargrimpulo, kiam li proksimiĝas al fino de sia veturado, al pinto. Certe pli facile ol pravigi verecon estas apliki empirian teston, per serĉado de nevero. Tio estas speciala malkovro de Popper. Do oni montras, ke se tio, kion ni submetas al testo, povas esti falsigita, tio estas nevera, se ĝi ne povas esti falsigita – tio estas eble vera – sed neniam vera ĝis fino. Povas esti, ke tio estas portempe vera, tial ke ni havas neperfektan metodon de ekkono. Popper aplikis en sia metodo premisojn de hipotezo (hipotelismo). Tio signifas, ke oni serĉas respondon je malkasita problemo pere de starigado kuraĝajn, neprobablajn hipotezojn, kiujn sekve oni submetas al falsigo. Nia tasko – asertis Popper, ne estas konfirmi rimarkojn, ordinarajn intuiciojn – nia tasko estas malkovrado.

Ĝenerale, se oni volas ion malkovri, ni devas eliri ordinaran stereotipon. Ni ne estos certaj, ni tion submetas al falsigo, se ni tion ne falsigos – tio estos portempa vero.

Korodicio (korodoracio) – portempa vereco. Objektive ĝi estas ankaŭ valoro, se jes, tiam forĵeto de valoro por gardi objektivecon estas enkonduko alian valoron kiel superan en la ekkonprocezo.

Dua modelo de Max Weber montras, ke akompanantaj agadon de homo valoroj postulas precipan ekkonon. Tiujn valorojn oni devas priskribi, ligi kun agadoj de homo por krei t.n. idealan tipon.

Ideala tipo estas modelo de fenomeno sen detalaj ecoj, sed montranta esencajn valorojn por tiu fenomeno. Max Weber ne proponis tamen ekkonon havantan karakteron universalan. Se valoroj estas diferencigitaj pro kultu raj rondoj, estas eble ekkoni idealan tipon en kadro de rondo. Ekkono devas esti eksternormiga, te. valoroj preferataj de esploranto ne devas esti bazo de pritakso fenomenojn, kiujn li prenas al esploro.

#### 4) Ofta demando estas ĉu en sociaj sciencoj estas pli ĝusta ekkono indukta, ĉu dedukta. Estas du specoj de konkludado, dominantaj en procedo de ekspliko: dedukta kaj indukta.

Laŭ PIV-o:

- **konkludi** – signifas: tiri per rezono logikajn sekvojn el argumentoj, principoj aŭ faktoj.
- **dedukti** – fari konkludon el la tuto pri la partoj el la specaro pri specoj, el generala principo pri ĝiaj konsekvencoj,
- **dedukto** – estas la **konkludo** farita el la tuto pri detaloj,
- **indukti** – konkludante el apartaj faktoj.

Pripensante, kiu el ili estas logike pli certa, sendube oni indikas la deduktan. La indukta konkludado estas nur propablilo.

En sociaj sciencoj oni aplikas plu da specoj de konkludado.

Proponinta de Popper estas konkludado dedukta, el tiuj kuragaj hipotezoj oni enkondukas konkludojn pri dedukta konkludado. Oni rekonadis, ke nur laŭ tiu-ĉi vojo oni povas alkonduki al malkaŝo de nova – eliranta ekster stereotipo. Konkludadon induktan oni aplikadis en natursciencoj kaj sociaj sciencoj.

En historio de la tempo de Popper aperas koncepto serĉata kiel alternativo por dominanta en turnopunkto de la XIXa kaj XXa jarcentoj metodo de analizo.

Per kio anstataŭigi metodojn de analizo? Pri metodo de analizo oni ĝenerale konkretigas agadon pri diseriga esplorado en konsistantajn elementojn ĉu peni trovi la elementojn de kombinaĵo aŭ kompleksaĵo.

Hodiaŭ pli kaj pli ofte kun reveno de grandaj teorioj oni konstatas malrapidan turnon al filozofia sintezo – por kiu analizo fariĝas nur unu el la elementoj. (PIV-o, precipe kiam oni iras de kompleksa al simila agado ĉu esploro).

## **5) Do nun ni venu al sekvonta problemoj kaj pripensu ĝin. Ĉu oni povas konstati, ke scienca metodo de sociaj sciencoj diferenciĝas de metodo de natursciencoj?**

Popper asertas, ke estas unu metodo – la sama, ĉu por sciencoj naturaj ĉu sociaj. Kiel sociajn sciencojn oni konceptas en tiu specifa maniero konsidero al tiuj valoroj, kiuj ne akompanas naturfenomenojn. Pli facile estas ekkonadi naturfenomenojn per ekzaktaj metodoj ol fenomenojn sociajn.

Respondon ni trovas ankaŭ en pasinta teori-ekkona koncepto, eliranta el elementa teorio de David Miler en Usono.

Pri tio skribas polaj aŭtoroj en la libro „Studoj el teoria sociologio”. Ili atentigas, ke pensante pri diferenco inter la mondo de naturo kaj la mondo de homo oni ofte subiĝas al specifa mito, kiu esprimiĝas en rekono, ke la mondo de la homo pere de siaj valoroj, estas pli komplika, la mondo de naturo – estas pli simpla. Ĉu vere estas tiel?

Denove ni revenos al problemoj – vereco.

Se tamen estas vero tio pri kio ni pli frue montris, se oni povas diri, se tiel estus – ni havus jam konatan mondon, de naturo, kaj ĝi daŭre ankoraŭ estas por ni nefinfermita, nedivenita.

Almenaŭ en logika senco ŝajnas la mondo de homo, mondo pli simila – tio estas mondo de li kaj de liaj produktoj.

Se ni ekkonos lin kaj liajn produktojn, ni ekkonos tiajn tutojn – tio signifas, ke oni povas apliki metodojn de natursciencoj en sociaj sciencoj, tamen kondiĉe, ke ni solvos problemojn de valoroj kaj problemojn ligitajn kun empiria testo.

Oni proponas anstataŭigi ĝisnunan koncepton de teorioj, kiujn oni nomis teorioj de unua aŭ dua generacio, per teorioj de generacio tria.

En tiu plej kuraĝa fluo de nuntempaj esploroj super agadoj de homo – oni proponas teston empirian, faratan en laboratorio, modelon de natursciencoj kaj kelkaj agadoj en sciencoj psikologiaj.

### **La terminon**

„*teston*” – oni difinas: (PIV-o) provo, celanta eltrovi kaj taksu la kapablojn, naturajn aŭ akiritajn por ebligi antaŭvidon de la estonta sintenado de la subjekto en difinitaj kondiĉoj.

Al testo oni submetas partoprenantojn de elementaj sociaj agadoj, kiuj estas esplorataj per la metodo de Popper: kuraĝaj hipotezoj kaj falsigoj. Hipotezo estas konkludata per dedukta maniero.

### **ĈIU TEORIO HAVAS TRI RIMEDOJN:**

- ĝeneralan,
- abstraktan,
- kaj universalan.

Veno al *ĝenerala* reguleco – en teorioj de unua generacio, estis senigita de aparataro veriganta. En teorioj de dua generacio oni proponas procedojn verigantajn en formo de tiu laboratorio. Teorioj de tria generacio povis klarigi fenomenojn: de konkreta loko kaj tempo.

Nek unuaj, nek duaj povis koncepti trian dimension de teorio: *universalecon*. Oni konstatis, ke nek ĝeneraleco, nek *abstrakto* povas submetigi al empiria testo. Ĝeneraleco en tiu senco, ke ĝi ĉion klarigas, fakte klarigas nenion, kaj abstrakteco – pro neindiko de loko kaj tempo.

Lige kun tiu teorio devas esti en certa senco ĝenerala, en certa senco abstrakta, antaŭ ĉio – universala, opinias kaj skribas adeptoj de elementaj teorioj.

Oni ofte sugestas en sciencaj verkoj kaj en diskutoj, eĉ riproĉas, ke teorio povas ekzisti kiel scio ne certa. Do ekzemple, se ekzistas teorio ne certa, kio okazus, aŭ povus okazi?

Teorio estas certa aŭ necerta, en tiu grado, en kiu ĝi havas ligon kun vero kaj maniero verigi ĝin. Teorio estas komprenata ankaŭ kiel historio de konceptoj, kiel metodologio de esploroj, kiel sistemo de heŭristikaj direktivoj, kiel scio pri aferoj ekstremaj, kiel interpreto de faktoj. Nun iomete pli detale pri scienco, kiun oni nomas: scio pri politiko – aŭ politologio, kaj iomete pli detalaj diferencoj inter ili, poste sekve pri kulturo de politiko.



## SKIZE PRI:

### SCIENCO PRI POLITIKO aŭ POLITOLOGIO

#### *La objekto de scienco pri politiko (politologio)*

Scienca politika scio estas produkto de politologiaj esploroj (realigataj de scienco pri politiko).

Diferencoj inter la disciplinoj :

- „politologio” kaj „scienco pri politiko” estas pli malpli tia, kia inter politika scio kaj scio pri politiko;
- semantikaj diferencoj inter disciplinoj havas genetikan bazon. Laŭ regulo tiuj disciplinoj ekestas per fakto de integrigo de diversaj sciencoj – esplorantaj aspektojn de vasta esplorkampo. Oni indikas, ke tiun esplorkampon oni nomas politikaj sciencoj.

En anglosaksaj landoj la integrita scienco ricevis la nomon: **politologio**. Do, se oni klarigas t.e. – politiko + „logio” t.e. scienco = politologio. En aliaj landoj oni uzis la nomon: politika scienco (ekz. en Francio). En Pollando de komenco de la 80-aj jaroj oni uzas la terminon: scienco pri politiko.

Tamen pli kaj pli ofte en scienca cirkulado ni trovas la nomon: politologio, kiu popularigas en la mondo, pro sia funkciismo. Eĉ tiuj, kiuj rekonas sin specialistoj de la fako de scienco pri politiko, nomas sin politologoj. (Malfacile estas trovi pli konvenan terminon).

Sciencistoj kiuj nomas sin politologoj, siajn esplorojn ili nomas **politologiaj** ne **politikaj**. Do, akcepto de tiu-ĉi termino, proksimiĝas al ĝenerale akceptitaj en la mondo principoj de konstruo de nocio-terminologia reto, kvankam ĝi foriras de tradicio – nelonga tamen – do grava en nia lando.

Optante por uzado de la termino politologio, ni ne estos konsekvencaj en tiu-ĉi prilaboro. Ĉar ni ne vidas argumentojn kontraŭ uzado de anstataŭa nomo: scienco pri politiko.

Ĉe difinado de la objekto de ĝiaj esploroj, tiu-ĉi lasta pli senpere indikas tiun-ĉi objekton – ĝi estas politiko. La nocio de politiko kiel objekto de politologiaj esploroj postu las tamen eksplikojn.

La termino „**politiko**” estas ĉerpita el malnovgreka lingvo, en kiu „**polis**” signifas „**urbo-ŝtato**” kaj „**politike**” arto de regado ŝtaton.

Oni diras, ke la unua uzis ĝin Platon en la verko „**POLITEIA**” (pola traduko = **La ŝtato**) kaj Aristoteles en la laboro: „**POLITIKO**” (traduko: „**Pri la ŝtato**” – „**Pri sistemo de Ŝtato**” aŭ „**Pri regado (reĝimo) en la ŝtato**”).

La tradicio elkondukita el la aristoteles koncepto de politiko, kiel kunligo de agado = (arto de regado scipoveco de direktado) kaj povo (la ŝtaton, aŭtoritajn instituciojn), decidas pri ekesto de ĝia difino kunmetita el du elementoj, do kvazaŭ en deŝiro de la fakto de organizado de homoj – tiajn sociajn instancojn, kiel ŝtato. Institucioj estas ankaŭ produkto de homa agado.

Koncepti politikon kiel agado starigas tamen demandojn, pri celo kaj rimedoj, pri valoroj direktantaj agadojn. Tiaj demandoj elvokas en konscio de esploranto – resonon en formo de turniĝo al katalogo de bazaj interhomaj valoroj kaj interesiĝoj de homaj komunumoj.

Alvoko al hierarkio de valoroj de politologo kreas en lia difino de politiko strukturon de respondoj, en kiu centraj estas kategorioj karakterizantaj agadojn, kaj iliajn celojn. Oni substrekas en difinoj de tia tipo, konscian kaj celecan karakteron de agado kaj ilian celvaloron, kiu por unuaj estas „komuna bono”, por aliaj „realigado de interesiĝoj (profitoj) de sociaj grupoj”.

Ĉar „komuna bono” premisas neceson de kunagado, do tia starigo de afero, kiel manifesto de solidarecaj vidpunktoj, decidas ankaŭ pri karakterizo de kunligo manifestiĝanta en agadoj, kiuj decidas pri konstituantaj politikon.

Kategorio de interesiĝoj (profitoj) apartaj, ol tuto de la socio premisas en si mem batalon por realigi interesiĝojn kiel bonon aŭ valoron deficitan. Konsekvenco de tiaj konceptoj pri kolizioj, estas difinado – politikon, kiel batalon por povo – konsiderata rimedo de realigo de interesiĝoj (profitoj) de sociaj grupoj: tavoloj, socioj.

Pli larĝe konstruitaj difinoj de tiu grupo koncentrigas, super priskribo la povon (ekz. kiel strukturon de selekto kaj realigo de klasaj interesiĝoj) aŭ grupoj batalantaj – por la povo, aŭ partoprenantaj en ĝi (senperaj agadoj de grupoj aŭ iliaj reprezentacioj kaj reprezentantoj).

Max Weber rekonis batalon, rekrutigon aliancantojn kaj akiradon –kollektivon bazon – motivoj esencaj por politiko. Li rimarkis, kio plej bone elmontriĝas en gravaj historiaj momentoj, kiam manifestiĝas kondiĉoj de amasigado por defendo de valoroj aŭ batalo por ĝi.

Li rekonis ankaŭ, ke politika agado postulas de politiko – subjekto decido. Tiun subjekto decido, oni povas pritaksi – malbona aŭ bona. La konsekvencoj starigi tiun–ĉi problemon en tia formo, estis por difinado de politiko diversaj.

De unu flanko: politika normo, estis rekonita, relativigita al rolo de instrumento de historia evoluo, kaj politiko fariĝis rimedo de akcelo kaj direktado – historian procezon sur ĝustan trakon. Tial politika decido ne nur venas antaŭ, sed ankaŭ difinas enhavon kaj funkcion de leĝo kaj partio havanta eon de plej alta grado de klasa konscio.

Ĝi estas ĉefa kaj senerara subjekto de decido, kiun ĝi legitimu kaj pritaksu. Oni diris en tiu loko pri kreado de ideo pere de Marks, kaj tiu marksismo-leninisma konsekvenco, starigas politikon en konceptoj de „*reala socialismo*” sur ĉefan kaj superstarantan lokon en socia vivo (kio eksponiĝas same en la scienco pri hegemonieco de politiko, kiel en nomigado de decidaj centroj tiaj, kiel „Politika Bureo” „Konsulta Politika Komitato de Varsovia Pakto”.) vidu lit. (B. Meissner ;(Hg)Der Warschaüer Pakt, Köln 1962)

De dua flanko oni eltiras „nacisocialismajn” konsekvencojn laŭ kiuj politiko entreprenanta el motivoj ekstreme naciismaj – pravigas militon, kiel „*politikon realigantan, per nepacaj rimedoj*” kaj decidoj de ŝtato – postulas absolutan obeemon – de ili dependas difino de „*malamiko*” kaj „*aliancano*” kaj enhavo de normoj.

Apartiĝante en opozicio de interna malamiko, etne fremda – hitlerismo alkondukis al milito kun ekstera malamiko por „vivspaco” por la germana nacio.

Motivo de batalo de rasoj – tiel, kiel en la kazo de komunismo de „*batalo de klasoj*” pravigas decidojn de faŝista povo. Tamen supre menciitaj konsekvencoj ne estas solaj.

Aliaj eltiraĵoj estas en la „ŝtatoj de bonŝtato”, kie interŝanĝo de anaro ĉe direktilo de la ŝtato, konforme al normoj kaj principoj, konstituciajŝanĝas politikon en ludon, kies rezultojn oni mezuras en „pagoj”, kiujn oni obtenas en formo de lokoj en parlamento aŭ en aŭtonomio, ministeriaj foteloj, postenoj en centra kaj loka administracio.

Al elektanto oni ofertas valorojn el kiu piej dezirata estas „sukceso”. Oni povas akiri ĝin – pere de politiko, kvankam en tiu ĉi sfero de ensekretario ĝi estas precipe rezervata por politikistoj, profesie koncentriĝantaj sur problemoj de povo. Emon „*politikigi*” leĝajn normojn kaj konformiĝi al ili kiel al superstarantaj valoroj, havas „*ŝtato de leĝo*”.

Max Weber rekonis valorojn – ideojn ordigantaj sferon de politikaj agadoj, kaj ilian elekton – situigis ekster racionala (racia) argumentado. Kun tiu malracia, demonia elekto de politiko – scienco povas nur ekagi, konsiigante al politikistoj – rezultojn de iliaj agadoj kaj vekigante ilian senton de respondeco. Tiu „*etiko de respondeco*” – estis haltigonta en ontencoj de Weber – revoluciulojn montrante al ili, ke idealoj pravigas, senkulpigas – nek rimedojn, nek celojn kaj ĉiu agado enhavas en si kulpon. Tiu kulpo ŝarĝas agantan subjekton pro politikaj rezultoj de ĝiaj entreprenoj.

Sed por la scienco konsekvencoj de tia Weber kompreno – de demonia elekto de valoroj, estas averto ankaŭ sinengaĝo en politikajn valorojn – anstataŭ en scion pri respondeco.

Kiel rezultas el pli trarigardo – politiko ligiĝas kun praktikado de publika povo, krome okazas farado de povaj decidoj t.e. restantaj sub influo de sociaj valoroj kaj koncentriĝantaj sur formado de normoj ĉirkaŭ prenantaj la grandajn sociajn grupojn.

Revenanata ankoraŭ al famaj teorioj de M. Weber oni devas ripeti, ke li ankaŭ estas la aŭtoro de teorio – pri povo, komprenanta kiel ŝanco por atingi de celoj eĉ kontraŭ rezisto (kontraŭstaro). Weber (traktas) konstruas sian imagon pri povo en orientado de rekonstrua idealizado – sed idealismo historia. Kvankam fakte laŭ opinio de kontraŭuloj tia defino nenion klarigas, tamen li provis klarigon doni en la formulo pri tri puraj tipoj de ĝusta regado. Li dispartigis ilin jĉne al:

- tipo de legala regado,
- tipo de tradicia regado,
- tipo de regado karisma.

Plu klarigante – Weber proklamis, ke se povo estas ŝanco – la regado (dominanto) estas la atingi de celoj, regas tiu – kiu atingas la intencajn celojn. Tamen la povon havas tiu, kiu havas ŝancon por atingi tiun – ĉi celojn. Kvankam ne ekzistas regado sen povo, tamen povas ekzisti povo sen regado. Li konstatas, ke oni povas atingi povon (aŭtoritaton) pere de ne agado – lasado de agado aŭ prokrastado (fordecidado aŭ ĉesado de agado). Ankaŭ oni povas enigi homon al iu agado laŭ nia deziro, ne suprenenigante lin, nur havante lin en povo. La subuleco ekzistas per aperado de heteronomismo kaj heterokefalismo.

Li ankaŭ klarigis ke homo aŭtonomia estas sendependa (memstara) kaj aŭtokefala – mem reganta. Do laŭ li homo heteronomia, estas la heterokefala subulo. De tie li trairas al **konsensualismo** – kiu havis la grandan rolon en la komenco de provoj pri Eŭropa-unuiĝo kaj pri kiu mi detale skribas en enkonduko de kurso pri problemoj de nuntempa Eŭropo.

En politologio ĝenerale oni diras pri tri konceptsciencoj kaj kunligitaj kun funkciado de povo.

Kiel la unua estas ĉiam citita Alfred PARSON – grava esploristo de problemoj pri povo kaj aŭtoro de propra metodo pri povo. Fakte li en politologio disvastigis la puran metodon de sistema analizo. Parson postulis ke oni ĉiam analizas pri sociaj faktoroj-rilatoj inter la tutaĵo ĝeneraligata.

Precizigante la propran metodon, ekzistas kiel la analizo en kategorio de sistemoj kaj nomataj kiel analita funkcionalismo de Parson. Li konstatis, ke celo de politiko estas mobilizado de necesaj kondiĉoj por atingi la sociaj celoj – traktataj kiel sistemo (societo kiel sistemo ĝenerala). Do konkludante, celo de politiko estas maksimumigo de talentoj de socio kiel celoj sistemaj en la kompreno kolektivaj. Li ankaŭ propagas **konsilialismo**, kiu estas videbla en la tutaj liaj ideoj – la klasika **konsensualismo** (aŭ **konsilialismo**) venas de la aprobo de filozofiaj pozoj (sintenoj) de agnosko homeostazo.

Laŭ Parson povo estas rimedsimbolo, pro tio kiel la rimedo por ŝanĝo (interŝanĝo) havas karakteron analogon, al ekonomiaj transakcioj-trairas simile kiel mono – oni povas ŝanĝi unu al alia.

Parsons konstatis, ke povon oni interŝanĝas al diversaj rimedoj en administrado al mono, en kulturo al normativaj devontigoj. Do povon oni ŝanĝas al diversaj rimedoj: influoj, premioj, efikrezultoj ĉu mono.

Detaligante oni oficiale diras, ke la ideo de Parsons ne estas origina, sed baziĝas sur la konceptoj de Wundt. Ideon de Parson akceptis Heryng nomuĝante ilin „SUI GENERIS” la natura konvencio.

En tiu teorio oni observas, ke partoj individuo, aŭ partoj de grupoj rilatas al si reciproke. Efike oni konstruas akcion kaj reakcion (agon – reagon).

Heyring observis kaj konstatis, ke la tuta afero similas (en tiu rilato li baziĝis sur la teorio de Maxwell) al merkata transakcio acetado – vendado, aŭ simple interŝanĝo de varoj en tiu loko-valoroj).

La konceptoj de M. Weber oni klasifias kiel la duan, ĝin mi jam priparolis.

Estis ankaŭ la tria teorio pri povo, la kreinto estas D. H. Wrong. Li konstatas, ke la ĉefa eco de povo estas – devigo (perforto). Li difinas, la povo aperas en diversaj formoj:

- devigo (perforto),
- manipulado,
- persvado,
- aŭtoritato.

En tiu – ĉi loko oni ofte diskutas pri diversaj kontroversaj teorioj aŭ opinioj, mi ilin nur listigos, pro manko de tempo, kaj poste plu iros.

Ĉu vera estas devizo :

**„ALTERA MANU FERT LAPIDEM, PANEM OSTENTAT? aŭ AD HOMINEM ARGUMENTUM? aŭ konata proverbo de Axel Oxenstierna: AN NESCIS, MI FILI, QUANTILLA PRUDENTIA MUNDUS REGATUR? kaj sukceson oni atingas per:**

**PER FAS ET NEFAS, kaj POTESTAS NON SOLUM SI INVITAT, SED ETIAM SI SUPPLICAT – COGIT. (la povo premdevigas ne nur kiam alvokas sed ankaŭ kiam petas). SUB KOLORE JURIS!”**

Ĝenerale oni opinias, ke signifas tio, ke la ĉefa fakto, ekipata en accidentalaj ecoj montras la inklinojn por atingi la intencaj celoj per uzado de devigo (perforta premo) rekten aŭ uzante aliaj spertojn. La premdevigo aperante pere de manipulado, temas pri povo kiu postulas pli ol tiu kiu eblas, aŭ al kiu homoj konsentas libervole. Dum persvado estas formo de povo, kiu enhavas direktivojn por ĝusta agado tamen por atingi oni sekurigas celon por uzi sankcion kontraŭ malobeuloj.

Wrong diferencigas la persvadon de sugesto. Laŭ li la persvado estas de unu flanke la malpermeso (interdikto) de dua flanke ordono. Uzante persvadon ni atentigas homojn, kaj metas al ili respondecon. Pro tio laŭ li estas la grava rolo de aŭtoritato kaj aŭtoritatulojn.

Wrong metas kvin formojn de aŭtoritato:

- subtenata de preperforto,
- aŭtoritato de karoto (povo de premio),
- aŭtoritato legala (tezo sublegita sur la teorio de Weber) konkorda kun tradicio aŭ karismo, apartenas al persono ĉu institucio kiu povas atesti la rajton por ĝin heredi,
- aŭtoritato de kompetentuloj (fakuloj, specialistoj),
- aŭtoritato bazigita sur personeco, ĝi eniras de ili.

En Pollando kaj ne nur oni ofte metas la kvara – koncepton pri povo – de Leszek NOWAK – kiu proklamas, ke povo estas sklavigado. Etatigo aperas en du formoj: burokratio kaj teroro. Tio estas la pura koncepto de konflikto.

Ankaŭ ofta estas diskuto kaj riproĉoj pri temoj: ***Kia estas la diferenco inter konceptoj de konsensualismo kaj konflikto?***

**KONSENSUALISMAJ** –atentigas al komuna bono kiel la bazo de politikaj agadoj. Dum konfliktaj – montras la kontrastoj inter la deziroj de regantoj kaj subuloj. Jus pli granda disproporcio en tiu tandem, jus pli ŝancoj por realigado. Ni subordigas ne al tiu kiu pravas, sed al tiu al kiu laŭ ni la pravigon havas (tenas).

Kelkajn precizigan vortojn oni necese devas diri pri la rilato: ***politiko, ideologio kaj moraleco***. Oni konstatas, ke en politiko moraleco, kaj ideologio estas kunigita pere de valoroj. La valoroj funkcias en politiko la same kiel en aliaj sferoj de homvivo. Moraleco kunigita estas pri pritaksado de

homagado rilate al valoroj. Ideologio direktiĝas al priskribo de konkreta stato, akceptado aŭ malakceptado de ĝenerale komprenataj kaj devigaj direktivoj.

Valoroj konsistas el intereso, celoj, bezonoj, ideoj, postuloj.

Oni konstatas, ke ekzistas rilatoj de valoroj kun politiko. Do pro tio devas ekzisti la moralaj modeloj (neutraleco de politiko aŭ gvidrolo de politiko).

Al la modelo de politika neutraleco rilate al moraleco oni klasifikas:

- makiavelismo,
- separacjonismo,
- cinismo,
- pragmatismo.

Al orientigo kiu proklamas sin al moraleco gravan rolon en politiko oni opinias en ideologio: kristana politika moraleco, fundamentalismo kaj orientado sen perforto (persekuteco).

Jen kelkaj precizigoj kaj klarigoj:

**MAKIAVELISMO** – kie konforma al principoj de regado rekomenditaj de makiavelismo, efikrezulto estas pli grava ol ruze kaj trompolege perfida politikismo.

**MAKIAVELO** (Machiavello); Italo – ŝtatistikisto kaj historikisto (1469–1525). La nomo de politika agado kaj vorto mem estis de lia nomo devena, i. a. signifas (PIV-o):

*„Konforma al principoj de regado rekomenditaj de regado rekomenditaj de makiavelismo, efikrezulto estas pli grava ol ruze kaj trompolege perfida politikismo. Politika aŭ sociala agmaniero, bazita sur malrekono de ĉia moralo, sistema uzo de trompado kaj strebado al la avantaĝo. (postsekv: stalinismo, jezuitismo)”*.

Ekstrema formo estas – **separacjonismo**, (laŭ PIV-o: tendenco postuli kaj agi apartiĝon de regiono, provinco dispartiĝe ge la ŝtato al kiu ĝi apartenas – ekz. siciliana, irlanda).

Oni propagas tie: kie finiĝas moraleco komenciĝas politiko – Klasikaj reprezentantoj de tiu nurto (direkto) estis Klaus Morgentau kaj Karol Schmidt. Ili proklamis, ke moralaj problemoj tuŝas la individuo ne grupo. Morala vidpunkto ne estas ligita kun politika, kaj fine, ke problemoj de grupoj kaj socioj-solvas politikon.

**CINISMO** (ciniko – laŭ PIV-o, apartenanta al antikva sekto de filozofoj, kiuj afekte malsatis la komforton kaj sociajn decregulojn). Cinismo estas variaĵo de makiavalismo. En politiko kaj moraleco oni uzas moralecon al propraj celoj. Oni agnoskas en malpura politiko malpuran povon (devenas de Stiven Laks, Albert Camus, Fiodor Dostojewski ktp). La devizo de ili estas „**kiam malaperas Dio ĉio estas permesata**”.

**POLITIKA PRAGMATISMO**: oni montras ke moraleco subordigas sin al politiko. Efiko en agado estas pli grava ol fideleco al moralaj kondiĉoj, kaj politikistoj. Oni ĉiam devas agi memorante pri respondeco, eĉ se oni devas modelagado dikti perforte al la grupoj.

Surbaze de diversaj modeloj oni ofte montras uzadon aŭ utilecon en praktiko de fama „*dekalogo de Machiavelli*”:

1. **principo de konservatismo** – kunigo kun antaŭa periodo, sed fakte manipulado, (oni uzas premiojn kaj punojn),
2. **principo de konsekvenco** – homojn oni devas trakti delikate aŭ kruele eĉ mortigi. (oni uzu: la premion por plifortigi agadon por profito de reganto, kaj punon por timigo. Puno devas esti efika kaj forta, ĉar ne forta naskas odveton –vengon),
3. **principo de kalkulado de efikoj** – la reĝo ne povas teni promesoj, ĉiam oni oni uzi la leĝoj por ne teni promesojn,
4. **principo de ofera kapriolo**, oni uzas por diŝiri kunigon inter agantoj kaj negativaj efikoj ne lia agado, kaj la kapriolo kulpas,
5. **principo respekto de valoroj kiuj agnoskas societo** – homoj estas kontentaj se oni ne deprenas iliajn profiton (valorojn) kaj dignojn. Se oni tion respektas nur devas konvenki la ambicion (homoj pardonas la morton de patro sed ne perdo de herdaĵojn,
6. **prinicipo ne respektado de integro**,
7. **oni uzu premon, fineza-ruzaĵon, kaj hipokritecon por atingi povon**,
8. **principo de evito la (nerekta) peran vojon**,
9. **principo de prudenta diagnozo**,
10. **principo de sendependeco**.

En politiko ofte estas ripetablaj terminoj „*povo*” kaj *ideologio*. Nun skize finante la temon mi revenos al povo. Por ideologio oni devas pli profunde diskuti kaj de diversaj vidpunktoj.

Kiel rezultas el pli supra trarigardo: politiko – ligiĝas kun praktikado de publikan povon, farado povajn decidojn t.e restantajn sub influo de sociaj valoroj kaj koncentriĝantaj sur formado de normoj ĉirkaŭ-prenantaj grandajn sociajn grupojn.

Pri povo oni povas paroli en signifo „objekto”. En tiu-ĉi signifo povon „oni havas” oni estas ĝia „posedanto”.

Povon oni povas kompreni kiel rilaton inter homaj subjektoj, el kiuj unu povas decidi pri agado de la dua. En tiu ĉi rilata aspekto, temas pri rilato de subordigo, kiam „reganto” havas rajtojn, kiujn li uzas, reguli konduton de „regato” kaj tiu dua subiĝas al ordonoj de la povo, kvankam ofte per sia sinteno influas sur manierojn de agado kaj enhavon de ordonoj de la povo.

Povo ankaŭ havas formon en senco subjekta, kiam ni parolas ekz „aŭtoritatoj decidas” „sinjoro povo – policisto” pravas ktp. Povo estas tie ĉi– tiu, kiu havas ecojn (rajtojn) trovigas en situacio, ke li povas efike eldoni ordonojn, malpermesojn al aliaj. Fine oni povas kompreni povon kiel decidan procezon.

Povo ne realigas en unufoja akto, sed ĝi estas kunmetita decida procezo, en kiu kiel juraj flankoj troviĝas multaj – ofte araj- objektoj. De tiuj unuj oni donas informojn pri objekto de decido kaj

pri neceso de situaciŝanĝoj, la duaj faras akton de elekto de decidaj variantoj, aliaj kontroias leĝoforton (validon) de tiu elekto, ankoraŭ aliaj realigas tiujn decidojn.

Krom tio la kazo de politika povo ne temas pri decidoj koncernantaj ĉiutagan konduton de persono, kiu mem pri si decidas, sed pri decidoj koncernantaj grandajn sociajn grupojn, kiam en decida procezo partoprenas selektive elektitaj valoroj– decidantaj pri normoj de konduto de tiuj grupoj.

Do politika povo en diferencigo de aliaj specoj de povo (ekz. gepatra povo, akademia povo ktp.) en grupoj de senpera kontakto, ĉirkaŭprenas sociajn rilatojn de granda skalo, tutajn komunumojn kaj en tiu senco ĝi estas publika.

Listo de baza literaturoj uzitaj en la tuta mia helprmaterialo por AIS–studentoj je la temo enkonduko al eŭrologio:

H. Przybylski; Politologia. Katowice 1998

Zygmunt Heyryng (1854–1931) elektitaj teorioj,

Feliks Koneczny (1862–1949) i. a aŭtoro de verko: Pola logos.

Koneczny estis ekde 1920 profesoro pri Historio de Eŭropo Orienta en Wilno, posteulo de Wilhelm Dilthey, priskribis la teorion de civilizacia diferenco, li proklamis, ke homo estas ne nur kreinto de civilizo sed ankaŭ fenomeno kiu kreskas de komuna vivo kaj samtempe li formas la vivon, estas lia produktfiko (konkorde kun la terio de Aristotelo kaj socia refleksie) – Koneczny estas kreinto de scio pri multo de civilitismo. Por li la modelo estis Aristotelo same kiel por Z.Rybicki kiu estas la aŭtoro de verko: Aristotelo. Komenco kaj bazo de scio pri societo. Kraków 1963.

Bayerische landeszentrale für politische Bildungsarbeit (Hg)

Nordatlantikpakt – Warschauer Pakt. München 1980.

Józef Chałasiński (1904–1979) Społeczeństwo i wychowanie. Kraków 1945,

B. Meissner; (hg) der Warschauer Pack, Köln 1962.

H.J. Morgenthau; Politics among Nations NJ 1967.

J. Hizing, Patriotism and nationalism in European History, NJ 1959.

D. Lerner; The passing of traditional Society. Glencoe 1958.

M. Weber; Essay in Sociology. NJ 1946

W. Dilthey; Einleitung in die Geisteswissenschaften. Leipzig 1883

Schüler Lexikon. 1997

Das Europäische Parlament kaj Au service L'UNION Europeenne (materialoj kaj dokumentoj el EU–Brukselo)



## *Strebante al eŭropeca Eŭropo kaj al internacia scienca komunikado*

### **La Esperantisto de la Jaro respondas**

Ni jam informis, ke OProf. Dr. sc. cyb. habil. *Helmar Frank*, prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), estas proklamita kiel la Esperantisto de la Jaro 2004. Hodiaŭ li respondas niajn demandojn.

**LOdE:** Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro 2004?

**HF:** Por esti sincera: mi surpriziĝis jam pro tio, ke mi antaŭe ne estis konsciiĝinta pri la ĉiujara elekto de „Esperantisto de la Jaro”. Krome, mi mem ne estus elektinta min, ĉar mi sentas min nur kiel tute sobra, kvankam centprocente konvinkita, ĉiutaga uzanto de la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto – kaj en mia profesia (faka) kaj en mia privata (familia) vivo. Ke la ver(d)aj Esperantistoj jam tion tiomgrade aprezas, tio kompreneble forte ĝojigis min.

**LOdE:** La internacia elektantaro voĉdonis por vi, ĉar ĝi alte taksis vian laboron en AIS. Bonvolu iomete rakonti pri la Akademio.

**HF:** Patron de AIS mi konsideras la Eŭropan Klubon, kiun mi kunfondis 1974, kaj kiu proponis 1981 al la registaro de la Respubliko de San Marino la fondon de „Internacia Libera Universitato” laboranta unuavice per la Internacia Lingvo, kiu „sufiĉe maturiĝis ankaŭ kiel scienca interkompreniĝilo”, kaj kies „granda, progresema kaj nacie, politike, rase kaj religie bone distribuita” parolantaro „meritas kaj bezonas kulturen centron en libereca stato ekster la grandaj mondpolitikaj grupiĝoj”, ni argumentis. Decidante 19 maj 1983 la realigon de tiu ideo en la formo de akademio (plivastiganta la laborkampon de la jam ekzistinta sanmarina Instituto pri Kibernetiko), San Marino fariĝis la „patrin”-lando de AIS. Ekde 1990 nia akademio aktivas ankaŭ (kaj nun precipe) ekster San Marino, unuavice en reformeŭropaj landoj. Sed ĝi akiris membrojn ankaŭ en ĉiuj aliaj logataj kontinentoj. Dokumentita historio kaj prezentado de la anaro troviĝas en la triparta libro „AIS”, kiun mi redaktis 2000 kune kun nia Senata Sekretario OProf. Dr.habil. Reinhard Fössmeier.

**LOdE:** En kiuj landoj estas agnoskataj la diplomoj de AIS, kaj kion AIS entreprenas por pligrandigi la nombron de tiuj landoj?

**HF:** Certan agnoskon flanke de la respondecaj ministroj kaj de ŝtataj universitatoj AIS akiris ekster San Marino sinsekve en Pollando, Rumanio, Ĉeĥio, Slovakio, Ruslando kaj Bulgario. Tio ne nepre signifas egalvalorecon de niaj kaj de ŝtataj diplomoj kaze de kandidatiĝo por ŝtataj postenoj. Tamen, la AIS-titoloj (bakalaŭro, magistro, doktoro, habilitdoktoro) estas publike porteblaj kaj utilaj, se oni aspiras laborlokon almenaŭ en komerco, industrio au kulturaj institucioj privataj. Per pliampleksigado de nia enretigita dulingva kursaro kaj pluevoluigado de studaddirektoj grandparte malcentre ofertataj,

AIS klopodas plialtigi sian reputacion kiel universitatega klerigejo ankaŭ en la pli konservativaj okcidenteŭropaj ŝtatoj. Helpos, ke nia studadregularo dekomence anticipis la esencon de la nun aktualiĝanta Bologna-principaro.

**LOdE:** Kio estas LEUKAIS kaj kiel ĝi funkcias?

**HF:** La 29an de aŭgusto 2004 okazis ĉe la impona Eŭropa Placo de la slovaka-hungara landlimurbo Komar-no la oficiala inaŭguro de la nestata „Libera Eŭropia Universitato Kelemantia de AIS”. LEUKAIS estu ĝemelo de nia internacia fakultatdepartemento inaŭgurita la 21an de februaro 2003 en la ŝtata rumania universitato „Lucian Blaga” en Sibiu-Hermannstadt. Ĉi tie jam studas magistriĝele unuaj studentoj en plejgrandparte tradicia maniero, sed ĉe docentoj de AIS instruantaj en la Internacia Lingvo. Kvankam LEUKAIS disponas pri la sama docentaro kaj jam pri deko da seminariejoj, ni antaŭvidas grandparte malcentran studadon surbaze de la interreta kursaro de AIS. Planita estas vigla interŝanĝo de studentoj kaj docentoj inter Sibiu kaj Komarno. Ĝis la fino de 2007 LEUKAIS estas gvidata de rektora triopo konsistanta el nobelpremiito OProf. Reinhard Selten, prezidantino de AIS Slovakio OProf. Dr.habil. Eva Poláková kaj mi mem.

**LOdE:** Kiom (mal)samas la nocioj Eŭropa kaj Eŭropia?

**HF:** La tradicia geografia nocio Eŭropo estas maladekvate difinita kiel la okcidenta, ĝis la urala montaro etendiĝanta parto de la eŭrazia kontinento. Eŭropio estas la evoluanta konfederacio, kiun konstituas la nuna Eŭropa Unio kune kun tiuj siaj najbaraj ŝtatoj, kiuj pli-malpli frue kaj probable aligos. Eŭropio do estas la politika mondregiono inter la Nordamerika Komerca Unuiĝo okcidente, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj oriente kaj la Araba Mondregiono sude.

**LOdE:** Oni scias, ke vi, la Esperantisto de la Jaro, apartenas al neniuj landa aŭ internacia esperantista asocio. Kiun opinion vi havas pri la celoj kaj pri la reala agado de la Esperanto-movado?

**HF:** Sen la Esperanto-movado ne eblintus starigi kaj ne eblontus pluevoluigi nian Akademion. Mia alta aprezo de la agado de la organizitaj Esperantistoj (ĉu „finvenkistoj”, ĉu „raŭmistoj”) ja montriĝas jam en la fakto, ke ekde la Hamburga UK 1974 (kiam mi ĵus estis eklerninta nian lingvon), do dum nun 31 jaroj, mi nur en tri Universalaj Kongresoj ne partoprenis. Mi opinias, ke la sukceso de la esperantista aktiveco nur povas kreski, se la Movadon ĉirkaŭas organizoj, kiuj *praktike* same agas kiel ĝi, sen ankaŭ en la *teorio* malakcepti ajnan alternativan neutralan lingvon, kaj sen reliefigi la Internan Ideon de Esperanto. Tiaj organizoj estas i.a. Eŭropa Klubo kaj AIS. Iliaj membroj ja grandparte sed tute ne senescepte aktivas ankaŭ en la Esperanto-movado. (Parenteze: al unu esperantista asocio mi ja apartenas: mi akceptis jam 1984 la honoran membrecon de la Rosaria Esperanto-Asocio en Argentino.)

**LOdE:** Ĉu AIS ĝuas subtenon de UEA, de SAT, aŭ de la Esperanta Civito?

**HF:** Same kiel aro da landaj kaj fakaj Esperanto-asocioj 1987 SAT subskribis kun AIS interkonsenton pri reciproka apogo. Ekde Ivo Lapenna ĉiuj UEA-prezidantoj estis AISanoj. Grégoire Maertens eĉ deĵoris plurajn jarojn kiel nia trezoristo. Lee Chong-Yeong klopodas starigi orientazian AIS-filion. Renato Corsetti partoprenas en nia instrulaboro kaj varbis en la oficiala UEA-revuo Esperanto por la celaro de AIS. – Oficialaj rilatoj al la Esperanta Civito ĝis nun ne ekzistas.

**LOdE:** Kiel vi resumas la ĉefcelojn de via nuna kaj estonta laboro?

**HF:** Miaj du (ĝis nun malpopularaj) precipaj celoj, en kiujn mi investas ĉiun akiritan reputacion (inkluzive nun la proklamitecon kiel la Esperantisto de la Jaro), estas la strebado al *eŭropeca Eŭropo*, kiu nek estas nura apendico de norda azio nek de norda ameriko, kaj la strebado al *internacia* scienca komunikado, en kiu ĉiu pluflegadu sian *propran* nacian lingvon, sed en kiu la transpontigo de la lingvolimoj ne okazas per *fremda* nacia lingvo sed per *internacia*, do *neŭtrala* lingvo.

**LOdE:** Ĉiu laŭreato devas respondi nian tradician demandon: Kiujn tri Esperantajn librojn vi kunprenus, ekzilate al neloĝata insulo?

**HF:** Unuavice mi kompreneble kunprenus la *Plenan Ilustritan Vortaron*. Por fake plulabori mi, due, kunportus la preskaŭ samampleksan, de Ana-Maria Pinter 1999 ĉe KAVAPECH eldonitan 11-an volumon de la plurlingva tekstaro *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko*, kiu enhavas i.a. miajn tri ĝis nun lastajn kaj ankoraŭ nepre pliperfektigendajn instrulibrojn dulingvajn. Tiam min afliktus la neceso, preskaŭ komplete rezigni pri mia kvin metrojn longa kolekto de aliaj libroj internacilingvaj. Por subteni meditado pri la neceso de rezigno kaj nealkroĉiĝo, mi verŝajne finfine elektus, trie, la maldikan, 2002 en Stockholm ĉe Eldona Societo Esperanto aperintan traktaĵon de AISano Gunnar Gällmo: *Kelkaj Faktoj pri la Budhismo*.

## **POLITOLOGIE Historische Skizze, Umwandlungen OBJEKT DER WISSENSCHAFT OBER POLITIK (POLITOLOGIE)**

Häufige Fragen sind es, ob es eine Disziplin mit zwei Bezeichnungen gibt, ob es faktisch zwei verschiedene Disziplinen gibt: „Politologie“ und „Wissenschaft der Politik“.

Gemäß der polnischen und englischen humanistischen Schule sagt man im Allgemeinen, dass die wissenschaftlichen Disziplinen „Politologie“ und „Wissenschaft der Politik“ durch das Einfügen verschiedener Wissenschaften erfolgt, die Gesichtspunkte eines Weiten Forschungsfeldes zu erfassen, was *politische Wissenschaften* genannt wird.

In angelsächsischen Ländern erhielt die integrierte Wissenschaft den Namen Politologie, d. i. POLITIK und LOGIA – Wissenschaft – Politologie. In anderen Ländern, etwa in Frankreich, gebraucht man die Bezeichnung politische Wissenschaft.

Povo estas tie-ĉi tiu, kiu havas ecojn (rajtojn) povas efike eldoni ordonojn kaj malpermesojn al aliaj.

Fine oni povas kompreni povon kiel decidan procezon. Povo ne realiĝas en unufoja akto, sed ĝi estas kunmetita decida procezo, en kiu kiel juraj flankoj elpaŝas multaj. Ofte arajsubjektoj, el kiuj unuj donas infromojn pri objekto de decido kaj pri neceso de situacisanoj, la duaj faras akton de elekto de decidaj variantoj, aliaj kontrolas loĝforton de tiu elekto, ankoraŭ aliaj realigas tiujn decidojn. En tiu ĉi – kazo; de politika povo temas pri decidoj; kiuj koncernas grandajn sociajn grupojn.

En diferencigo de aliaj specoj de povo (ekzemple gepatra povo, akademika povo) – politika povo ĉirkaŭprenas sociajn rilatojn de granda skalo, tutajn komunumojn kaj en tiu senco ĝi estas publika.


Baza speco de politika povo- estas ŝtata povo. politika povo krom ŝtato povas esti realigata en aliaj organizoj ekz teoria, aŭtonomio (loka povo ekz. koncernas organizon sur loka teritorio ŝtupo) politika povo (publika povo) realigas multajn funkciojn. Ĝi realigas distribuan funkcion per distribuo kaj reguligo aliron al bonhavaĵoj ne nur materialaj, sed ankaŭ valorajn, ligitajn kun bezono de sekureco, socializo, uzado de informado ktp.

Manipulado per bonhavaĵoj kaj valoroj estas ĝenerala aplikata maniero de praktikado de povo kaj ankaŭ certigado al si aliron al povo. Ĉar disponanto pri bonhavaĵoj havas eblecojn atingi povon, kaj akirante ĝin akiras ankoraŭ pli larĝajn eblecojn influi sur homojn pere de tiu funkcio.

Povo realigas stratifikan funkcion t.e. kontribuas al divido de socio kaj sociaj grupoj en diversa maniero partoprenantaj en povo. En kondiĉoj de diskonstruitaj strukturoj de povo sur diversaj etapoj kaj etaĝoj de pova decidfarado estas dependaj de si sociaj grupoj kaj ilia reprezentaro. Apartaj grupoj de socio elektas sian reprezentaron en formo de partioj agantaj en politiko kiel politikaj fortoj. Reprezentantoj – laŭ regule lideroj de tiuj fortoj-reprezentas ilin en aŭtoritatoj: leĝodona, ekzekutiva kaj juĝa.

Ekzisto de reprezentado enkondukas al grupo certan ordon, principojn reguligantajn kondutojn, superstaron kaj ordigitecon de reprezentantaj korpoj, en kiuj povas partopreni ĉiuj partoj

de socio. Kompreneble rilato de povo okazas interne de tiuj organizoj kaj institucioj, kiel ankaŭ en rilatoj inter ili (desegnaĵo 2).



*Desegn.2. Ŝkemo de sistemo kaj agado de politika aŭtoritato.*

Baza speco de politika povo estas ŝtata povo, t.e. tia variaĵo de povo kiu estas realigata en specifa organiza strukturo kia estas ŝtato.

Politika povo krom ŝtato povas esti realigata en aliaj organizoj ekz. teoria aŭtonomio (loka povoekz.koncernas organizon sur teorie loka ŝtupo).

Estas klare, ke tiel komprenata politika (publika) povo realigas multajn funkciojn. La terminaro „funkcioj“ estas komprenata diversmaniere. Laŭkutime kiel direkto de agado, aŭ posteno aŭ speco de ligo en aro. Tamen en tiu kazo temas pri objektiva efiko rezultanta el agado aŭ el ekzisto de iu sistemo.

En tiu ĝuste signifo povo funkcias kiel rimedo de distribuo de bonhavo kaj valoroj – do realigas distribuan funkcion, per distribuo kaj realigo aliron al bonhavaĵoj ne nur materiaj, sed valoroj ligitaj kun bezono de sekureco, socializo, uzado de informado ktp. Manipulado per bonhavaĵoj kaj valoroj estas ĝenerale aplikata maniero de praktikado de povo kaj ankaŭ certigo alsimaliron al povo. Ĉar disponanto pri bonhavaĵoj havas eblecon atingi povon kaj akirante ĝin akiras ankoraŭ pli larĝajn eblecojn influi sur homojn pere de tiu funkcio.

Povo realigas funkcion stratifikan, t.e. kontribuas al divido de socio kaj aliaj sociaj grupoj, en diversa maniero partoprenantaj en la povo. Oni diras, ke ekzisto aŭ regado de povo – regule povas okazi – precipe en kondiĉoj de diskonstruitaj (disvolvita) strukturoj de povo. Tamen ĉar ofte laŭregule okazas, ke ekzistas du antagonistaj kaj batalantaj kontraŭ si por povo du sociaj grupoj. Sur diversaj etapoj kaj „etaĝoj“ de pova decidfarado estas dependaj de si sociaj grupoj kaj ilia reprezentaro. Enkonduko tie ĉi la noción de reprezentado havas sufiĉe grandan por politiko signifon, ĉe tio oni devas diferencigi reprezentadon en elementa senco kaj ekzistenciala senco.



En la dementa senco ni parolas pri reprezentado tiam, kiam neceso de artikoligo, sinesprimo en politiko naskas bezonon eligi reganton aŭ regantan grupon, tavolon, politikan klason. Politika socio ekestas, kiam komencas artikoliĝi (sin esprimi) kaj alvokas reprezentanton. Por ĝia plua ekzistado estas bezonata krei tutan reton de reprezentantaj organizoj kaj institucioj.

Tiel kiel socio alvokas sian reprezentanton, apartaj grupoj de tiu socio alvokas reprezentanton en formo de partioj agantaj en politiko kiel politikaj fortoj. Reprezentantoj – laŭregule lideroj de tiuj fortoj, reprezentas ilin en leĝdona, ekzekutiva kaj juĝa aŭtoritatoj. Aperoj de reprezentado per artikoliĝo, kiu estas esprimo de bezonoj, enkondukas al grupo ordon, certan ordigon, principojn kaj normojn reguligantajn kondutojn, eliĝadon de reprezentado, superstaron kaj ordigitecon de reprezentantaj korpoj, en kiuj povas partopreni ĉiuj integraj partoj de socio.

Tiun sferon de socia vivo, kiun karakterizas prezentitaj de ni ecoj antaŭ ĉio agadoj de reprezentantaj fortoj, batalantaj kontraŭ si aŭ kunagantaj por utiligi publikan povon (antaŭ ĉio la ŝtatan) al atingado de valoroj kaj bonhavaĵoj multvaloraj por grandaj sociaj grupoj – ni rajtas nomi politiko aŭ sfero de politika vivo de la socio. Limoj, disigantaj tiun sferon de aliaj sferoj de socia vivo ne estas konstantaj, sed sanĝiĝas kaŭze de aperantaj novaj kategorioj de sociaj fenomenoj, akirantaj politikan karakteron.

Ili donas tamen bazojn por apartigi ĝin de aliaj sferoj de socia vivo, kiuj tamen reciproke influas sur sin. Do tiujn limojn formas: ekonomio (mastruma vivo) sociaj strukturoj, organiza – institucia strukturo de la socio, valoroj kaj normoj sociaj, socia konscio.

Alimaniere dirante: kampo de politiko; limigita estas per elementoj de socia vivo ligitaj kun ĝi per ligoj de reciproka dependeco. Bazan elementon de tiu kampo formas ekonomio kiel sfero, en kiu kristaligas socialaj interesiĝoj de sociaj grupoj.

Kompreneble la nivelo de ilia artikoligo influas sur postulojn de politikaj ŝanĝoj. Tiamaniere ekonomiaj bezonoj trovas respeguligon en la sfero de politiko kaj ankaŭ en la sfero de socia konscio. Ili influas ankaŭ sur sociajn kriteriojn de valorigo.

Formoj de socia konscio, kiel ni pruvis tion jam sur la ekzemplo de politika konscio, influas sur ŝanĝojn en sociaj streboj, decidante pri subjektivaj ekagadoj politikaj.


Politiko estas produkto de ekzistantaj sociaj strukturoj, ekster kiuj ĝi ne estas. Ne mirinde do, ke rilatoj inter sociaj grupoj, kaj eĉ nur ekzistantaj de tiaj, aŭ aliaj grupoj, decidas pri politiko. Ĝuste inter iliaj reprezentantoj disvolviĝas politika „ludo“.

Sociaj strukturoj kreas kondiĉojn de ekzisto kaj funkciado de organizoj kaj institucioj sociaj kaj inter ili politikaj kaj ankaŭ valoroj kaj normoj. Organizaj eblecoj de socio, kaj kun tio sistemo de sociaj institucioj estas strikte ligitaj kun ekonomiaj eblecoj de socio. Valoroj kaj normoj sociaj difinas rilatojn inter sociaj grupoj, iliaj institucioj kaj unuoj influante sur hierarkion de celoj, pritaksoj de sociaj streboj, influas do procezojn sur la sferon de politiko, kiu resende influas sur ilin, preferante aŭ fiksante (determinante) devigajn normojn. En spaca dimensio politikaj procezoj ruligas en certaj

geografiaj limoj. En la tempa dimensio, politiko limigita estas per historia pasinteco kaj realiĝante estonteco, poste ĝi alprenas konkrete – la historian formon.

Pro neceso sur la sferon de politiko, kiu resaende influas sur ilin preferante aŭ fiksante (determinante) devigajn normojn.

Konsciigo al si larĝecon de la kampo de politiko (*desegnaĵo 3*) kreas ŝancon difini ĝin helpe de faktoroj havantaj influon sur ĝin kaj formantaj limon de ĝia sfero.



*Desegn.3. Kampo de politiko.*

Uzante ĉiujn elementojn kusantajn sur perimetro de la kampo politiko oni povas difini ĝin kiel sferon de faktoj, fenomenoj kaj procezoj estantaj produkto de ekzistantaj sociaj strukturoj kaj ekonomiaj rilatoj, sur kies ekeston havas influon normoj kaj valoroj sociaj, strukturoj instituciaj-organizaj de la socio kaj ankaŭ konkretaj formoj de socia konscio, decidantaj pri kunagado, aŭ batalo de fortoj por bonhavaĵoj kaj valoroj komunaj aŭ reglamentitaj de publika aŭtoritato.

Ĝi faras reciprokan influon sur staton de ekonomio, sociajn strukturojn, konscion, normojn kaj valorojn sociajn sur la kuron de historiaj procezoj okazantaj en konkrete – historiaj kaj spacaj kondiĉoj internaj kaj eksterlandaj.

### **GENEZO DE POLITOLOGIO (scienco pri politiko)**


Uzante supre donitan skemon de la kampo pri politiko, oni povas bildigi objekton de esploroj de diversaj sciencoj sociaj kaj humanistaj, enpaŝantaj per sia sfero en la esplorkampon de politologio (scienco pri politiko). Ekonomio kaj precipe makroekonomio havante kiel objekto demandojn de

produktado, divido kaj interŝanĝo de materiaj bonaĵoj, povas interesiĝi en la kampo de politiko pri la rilato „Pa”.

Sociologio esploranta aran vivon de homoj, ĝiajn formojn kaj strukturojn povas ĉerpi el la kampo de politiko en la rilato „Pc” pli malmulte „Pb” kaj „Pe”. Scienco pri organizado povas enpaŝi en la kampon de politiko de la flanko „Pb”. Scienco pri pasinteco – historio interesiĝas pri politiko en la rilato „Pt – 1”. Juroscienco, kiu okupiĝas pri ŝtato kaj leĝo kaj konceptoj (vidpunktoj) pri ĝi, povas esplori politikon en la rilato „Pd” kaj „Pb”.

Etiko estane scienco pri valoroj kaj normoj, pritaksoj kaj modeloj de konduto okupiĝas pri la rilato „Pd”. Aliaj fakoj de filozofio – ankaŭ pri la rilato „Pe”. Socia psikologio esploranta psikajn procezojn de aro povas okupiĝi pri la rilato „Pe”. Geografion povas interesi kampo de politiko en la rilato „Pf”. Ĉiuj tiuj sciencoj (desegn.4) enpasante en la kampon de politiko apartigas siajn fakojn, kiujn oni povus nomii politikaj sciencoj. Ni rajtas kalkuli al ili tiel politikan ekonomion, sociologion pri politiko, kiel ankaŭ politikan historion, politikan geografion, psikologion de politiko, sciencon pri ŝtato kaj leĝo (konstitucio). Pro ilia ekzisto oni negaciis ne nur bezonon sed ankaŭ eblecon formi en estonteco unu disciplinon (politikan sciencon politologion, aŭ sciencon pri politiko) des pli, ĉar ili priservis sin per konvenaj por sia patrina disciplino metodoj de esploroj.

En institucionala senco esploroj de politiko, kiel ankaŭ didaktiko estis disvolvigataj en la kadro de morala filozofio kun ĝia tri divido je etiko, ekonomio kaj politiko en aristotelesa koncepto kun specifaj al mezepoko skolastikaj aldonadoj. Nur en la tempoj de Klereco en Pollando, same kiel en aliaj landoj – tiu stato ŝanĝiĝis.



Desegn 4. Kampo de politiko – esplorkampo de politikaj sciencoj

Politika problemaro ektraviĝis kiel „politika leĝo de naturo” en kadro de racionalisme konceptata leĝo – konsente kun konceptoj de fiziokratoj – en komuneco kun ekonomio. Nur en la fino de XVIIj.c. komenciĝis apartiĝi tereno de sciencoj ligitaj kun t.n.kameralistiko t.e.sciencopri administrado kaj financoj de la ŝtato – nomata „ŝtataj sciencoj”.

Tia ĉi traktado ilin dominis ankoraŭ en komenco de XIX jc. kaj influis sur la karakterizan dividon de formiĝado de „la scienco pri la ŝtato” el unu flanko, kaj el la dua flanko – de politikaj detalaj. Tiun ĉi – unuan oni klasifikas al scipovoj juraj, tiujn duajn al administraj – ŝtatrezorejaj.

En la dua duono de XIX kc. sekvis dekadenco de la filozofio kun maksimalista orientiĝo, akcentiĝis influoj de pozitivismo, kaŭzante konceptadon de scienco kiel detalaj disciplinoj pri faktoj traktataj empirie. Tio kaŭzis fermiĝon de esploroj je politiko en apartaj disciplinoj, precipe de historio, juroscienco, sociologio, scienco pri administrado, ekonomio. Tio influis sur la fakton, ke ili esoloris ĝuste diversajn aspektojn de la kompo de politiko kaj ke neniu el disciplinoj ampleksis tuton de tiu kampo. Tiamanier komencis por longe domini la koncepto – pluralisme prenataj politikaj sciencoj, kel sumo de tiuj soci – humanismaj sciencoj.

En Pollando (Polujo ) tie, kie administrado liberala de konerintoj tion permesis, ekekestadis „lernejoj de politikaj sciencoj”. La unua ekestis en 1911 en Krakovo. En la fino de I-a mondmilito inaŭguris sian agadon varsovia lernejo, al kiu patronis Ludwik Krzywicki kaj Ludwik Kulczycki, kiu kiel profesoro de tiu lernejo komencis ĝian funkciadon en 1918 j.

Pluralisma maniero de esploroj je politiko, praktikata de malkoncentritaj „politikaj sciencoj” daŭris en Pollando dum la tuta intermilita periodo, kvankam ŝanĝiĝis ĉi-tie influoj de tiamaj francaj konceptoj de politikaj sciencoj, kiuj en la fina baza fazo de la intermilita periodo komencis integriĝi surbaze de ĉefa rolo de esploroj je sistemo de sciencoj juraj, historiaj kaj pri administrado. En 1929j oni fondis en Varsovio – Centran Komitaton de Polaj Institucioj de Politikaj Sciencoj.

La tasko de Komitato estis koordini esplorojn kaj didaktikan praktikon de ĉiuj superaj lernejoj de politikaj sciencoj (ekzistantaj en Krakovo, Lvovo, Vilno, Poznano) kaj transformis varsovian lernejon en Akademion pri Politikaj Sciencoj.

Milito kaj okupacio malebligis normalan funkciadon de polaj sciencaj institucioj, sed sekreta instruado ampleksis en sekreta Jagiellona Universitato, ankaŭ Konspirantan Internacian lernejon de Politikaj Sciencoj.

En la jaro 1945 reaktiviĝis Akademio de Politikaj Sciencoj en Varsovio. En la jaro 1959 oni transformis ĝin en Ĉefan Lernejon de Eksterlanda Servo. En Krakovo surbaze de pli frua Lernejo pri Politikaj sciencoj ekestis en 1947 Lernejo de Sociaj sciencoj. Jam tiam la vojoj disvolviĝo de esploroj kaj didaktiko en landoj oriente de „fera kurteno” kaj okcidente de ĝi komenciĝis disigi. Plej bona pruvo de tio estis la jaro 1948, kiam en landoj de „popola demokratio” – satelitaj al USSR – apud partiaj lernejoj de marksismo-leninismo, oni komencis enkonduki laŭ ekzemplo de sovetaj lernobjektoj en lernejoj „scienca socialismon”.

En Pollando ekkde 1947 j. ĝis 1950 oni instruis en superaj lernejoj „scion pri Pollando kaj nuntempa mondo”. En la sama jaro (1948) scienca konferenco organizita en parizo sub egido de UNESCO, fiksas la nomon „politika scienco” (en singularo) kaj ĝian kampon.

En tiu-ĉi kampo lokiĝis problemojn de:

1. teorio de politiko,
2. politikaj institucioj,
3. partioj, grupoj de premo kaj politikaj opinioj,
4. internaciaj rilatoj.

En tiuj decidoj nemalgrandan influon havis disvolvo de amerika „politikaj science” („politika scienco” aŭ „scienco pri politiko”). Forte esprimataj bezonoj de ŝtata aparato sur federacia kaj stata ŝtupoj, de diplomatia servo, de sociaj organizoj kaj institucioj, de esplor-sciencaj institutoj kaŭzis ekeston de studoj kaj fakultatoj de scienco pri politiko en amerikaj superaj lernejoj. Ĉiuj studentoj trairas kurson pri politiko.

Ankaŭ en Granda Britio, kie jam en 1895 j. ekestis London School of Economics and Political Sciences, disvolviĝis studoj „politika Scienco”, kiuj ĉirkaŭprenas studentojn de t.n.sciencaj sekcioj en superaj lernejoj.

Sub la influo de amerika „scienco pri politiko” tiun ĉi objekton oni enkondukis en superajn lernejojn en Federacia Germana Respubliko, kie en 1949j. ekestis Deutsche Hochschule für Politik.

Sekve ekestis Hochschule für Verwaltungswissenschaft en Speyer edukanta kadrojn de ŝtataj oficistoj kaj Hochschule für Wissenschaften en Munkeno kaj Berlino.

Altan rangon akiris la objekto „sciencoj pri politiko” en skandinavaj ŝtatoj. En Norvegio apud tiu-ci objekto ekestis memstaraj institutoj esplor-sciencaj (ekz. de Christian Michelsen en Bergen, de Esploroj je Paco en Oslo kaj aliaj). En Svedio scienco pri politiko populariĝis sub la nomo „scienco pri ŝtato”. Tiujn studdirektojn gvidas universitatoj. Ĉiu studento, volante fariĝi diplomato de ia ajn direkto de sociaj sciencoj, devas trapasi ekzamenon el „scienco pri ŝtato”.

En Francio grandegan rolon en popularigo de la scienco pri politiko ludas institutoj de politikaj sciencoj, ekzistantaj en superaj lernejoj, gvidantaj trijarajn studojn. Iliaj diplomoj havas malfermitan vojon por kontinuiigi studojn en lernejo de Publika Administrado kaj aliaj elitaj lernejoj de tiu tipo.

En komenco de 50-aj jaroj en sociaj sciencoj sekvis signifa turnopunkto – signiĝis foriro de mallarĝa empirismo kaj oni komencis. Prezi rolon de teorioj tiel ĝeneralaj, kiel ankaŭ de meza atingodistanco. Oni starigadis al ili jam tamen akrajn postulojn de scienca precizeco. Tiu tendenco favoris integrigon de disciplinoj, permesis profiti el ilia metodologia akiraĵo sur „kontaktoj” (kuntuŝoj) vekis novajn, kreivajn esplordirektojn. Sur la tereno de politikaj sciencoj – ĝi decidis pri ilia integrigo, tie kie ĝis nun tio ne okazis, aŭ pri rapideco de ekestado de teorio, por kies bezonoj oni profitis el spertoj de aliaj sciencoj.

En Pollando situacio estis tamen pli konplika ol aliloke, antaŭ ĉio pro administra – partia direktado. De unu flanko en 1950j. Pollando aliĝis al Internacia Societo de Politikaj Sciencoj (IPSA) kiel la sepa laŭvice lando kaj la unua el ŝtatoj de „reala socialismo”. De la dua flanko, en 1951j. oni likvidis Akademion de Politikaj sciencoj kaj Krakovan Superan Lernejon de Sociaj Sciencoj. En la sama jaro oni enkondukis en ĉiujn superajn lernejojn dusemestran kurson pri „marksismo-leninismo”.

Tiu ĉi objekto ekzistis ĝis 1955j. Kaj en 1957j. el federigo de specialistoj pri sciencoj okupiĝantaj pri diversaj sektoroj la kampo de politiko, ekestis Pola Societo de Politikaj Sciencoj. Komenciĝis diskutoj je la temo de integriĝo de politikaj sciencoj. Vigligo tiurilate influis sur la decidon enkonduki en superajn lernejojn en la akademia jaro 1963/64 „bazojn de politikaj sciencoj”, unue eksperimente en 13 superaj lernejoj, kaj sekve oni larĝigis en la akademia jaro 1970/71 sur ĉiujn. En 1972j. ekestis Komitato de Politikaj Sciencoj de Pola Akademio de Sciencoj, kiu organizis kaj koordinis politologiajn esplorojn.

Diskuto, kies bazo estis bezono de integriĝo de politikaj sciencoj, oscilis unue ĉirkaŭ kreo de iu centro por konsolido de tiuj sciencoj, kreo de disciplino plej „politika” estanta „scienco kondukanta”. Konstruiĝis en ĝi du orientadoj: jura kaj sociologia. La jura por „kondukanta” rekomendis teorion de ŝtato (ĝeneralan sciencon pri ŝtato), la sociologia – sociologion de politikaj rilatoj. Tuto de politologoj foriradis tamen de la koncepto de politiko kiel agado de ŝtato, kritikis ankaŭ juran formalismon kaj unuflankecon de vido de esplorkampo per prismo de normoj, kio starigadis teorion de ŝtato sur perditan pozicion. Rolon de sociologio de politikaj rilatoj subfosadis sociologoj mem indikante, ke ĝi estas disciplino detala, al kiu mankas rigado ĝenerale 0 teoria kaj tuteca.

Pro tio en diskuto pli kaj ofte aperadis la opinio, ke integriĝo de politikaj sciencoj estas afero de tuto de politologiaj kadroj. Tia traktadomaniero de la problemo vere decidis. Grupo de science – didaktikaj laborantoj rekrutiĝantaj komence el grupo de specialistoj de apartaj politikaj sciencoj kaj poste de diplomitoj de universitataj studoj pri politikaj sciencoj malrapide aliradis per sistemo de komunaj konferencoj, simpozioj, kolektivaj laboroj al unuforma aparataro koncepta – terminologia kaj al metodologiaj determinoj. En 1980j. – ne sen influo de la socia-politika situacio, dank’ al kiu sekvis alproksimiĝo al la monda scienco – oni decidis pri la nomo: „scienco pri politiko” (en singularo).

Nun – post certa tempo de ekzistado de la scienco pri politiko - alvenis tempo por nova dilemo, videbla en jena laboro: „scienco pri politiko” – ĉu jak „politologio”?

## **Tradicioj de politologiaj esploroj.**

Pli supraj fragmentoj de jena teksto sugestus junecon de la disciplino kaj ĝiam institucionalan novecon (kaj almenaŭ nuntempon), tamen esploroj de politiko kaj ilia teoria esprimo en formo de skribe esprimitaj konceptoj – havas tre longan historion. Esplorakiraĵo kaj peno de individuaj klopodoj portataj estas tra jarcentoj. Efikoj de mensa laboro de generacioj estas senĉese kolektataj kaj konfirmantaj, interrompitaj enhavoj de teoriaj pripensoj denove ligataj. De frumateno de politika vivo, do preskaŭ de komenco de la homaro, observantoj de politikofunkciado esprimadis konjektojn fluantajn el tiuj observacioj.

Al unuaj el tiuj pensistoj de antika mondo, kiuj formis siajn observojn en konceptojn kaj rekomendojn por politikistoj apartenis Konfucio (Kung – fu – cy), vivanta en Ĉinio en la jaroj 551-479 a.n.e., aŭtoro (parte) de fama „Kvinlibro”(Wu – cing), en kiu li prezentis regulonde morala-politika ordo, postulante restitucion de tradiciaj socia-politikaj dependecoj (t.n. wu – lun). Politika ordo devis konsisti en dependeco de subalternulo de regulanto, en hegemonio de principoj (žen), laŭ kiuj justeco (i) kaj rito kreas bazojn de patriarka hierarkio, en respektado detalajn direktivojn de aŭtoritatopraktikado helpe de specialiĝinta kasto de oficistoj.

Al eminentaj pensistoj de antika Grekujo apartenis: Platon (429-384 j. a.n.e.) kaj Aristoteles (398-322j. a.n.e.). Platon reprezentis en siaj verkoj („Respubliko”, „Leĝoj”) tendencojn aristokratajn kaj elitajn, kontraŭrespublikajn kaj kontraŭdemokratajn. Observante brutalojn por povo li venis al konvinko, ke evolucio de ŝtato iras en malbonan direkton, ke formoj de regadoj degeneras. Oni povas kontraŭagi al tio pere de regado de filozofoj. „Ĝis kiam filozofoj ne tenos en la mano reĝan regadon en la ŝtato, aŭ tiuj, kiuj nun nomas sin reĝoj kaj potenculoj, ne ekokupos sin honesta kaj profunde pri filozofio, kaj ĝis kiam ne kuniĝos en unu tuton ambaŭ faktoroj, t.e. ŝtata povo kaj filozofio, kaj ĝis kiam tiu ĉi multego da nuntempaj geniuloj, kiuj ekskluzive al unu el ambaŭ celoj strebas, ne estos ekskludita el regado, ĝis tiam (...) oni ne povas antaŭvidi finon de malfeliĉj por ŝtatoj, nek ĝenerale, kiel mi opinias, por la homa gento”.<sup>18</sup>

Kunigo de politiko kun filozofio povas okazi laŭ Platon pere de scienco, edukado aŭ kun apliko de forto.

Principo de ŝtatofunkciado ne estas tamen saĝeco kaj scienco, sed kuraĝo en la kazo de timokracio (t.e. regado de militistoj), avido en oligarkio (regado de riĉuloj), anarkio en demokratio (kiel regado de popolo) kaj krimo en la kazo de tiranio (en kiu dominas egoismo de despota tirano). Tiel de la ŝtato, kiu ekestis sekve de homaj bezonoj, strebas de la plej bona principo al la plej malbona. Haltigi tiun ĉi porocon oni povas – kiel argumentas Platon en „Leĝoj” pere de serva reglamento de vivo civitanoj, pere de edukado, religio, fermo de politiko kontraŭ ekestaj influoj, sistemo de regado ne evitanta denuncadon. Pro siaj konceptoj platon fariĝis prekursoro de izolismo kaj fermita socio,

---

<sup>18</sup> Platon. Rzeczpospolita (Respubliko), Kraków 1928, przekł (trad.) S. Lisiecki

meritokracio (koncepto preferanta regadon de specialistoj), pesimisma vizio de evolucio de la ŝtato de „ora” aĝo al la „fera”.

Aristoteles reprezentis tute alian mensan modelon ol Platon. El liaj multaj verkoj konserviĝinta „Politiko” prezentas antaŭ ĉio siaspecan metodologion, en kiu analizo anticipas konjektadon (konkludon). Empiria metodo permesis al Aristoteles realisme percepti politikon. Por Harigito la ŝtato kiel organizo suverena kaj ĉia-flanke ĉirkaŭprenanta, ekestis en natura maniero, ekzistas por certigi al homoj bonan vivon, ne celas iun idealan modelon.

Ĉar formo de sociaj bataloj, de la ŝtato de ekonomio, de karaktero de nacio kaj geografia situo, grandeco de teritorio ktp. Bona sistemo en unuj kondiĉoj povas montriĝi malbona en aliaj.

Ĝenerale bonaj formoj de la ŝtato estas – monarkio, aristokratio kaj „politea”, bazantaj sur la kriterio de regado realigata por utilo de la civito. Kontraŭe malbonaj – tiranio, oligarkio kaj demokratio, ĉar tio estas regadoj realigataj por utilo de regantoj. Principa divido de formoj de la ŝtato estas tamen poseda status (ŝtato), laŭ kiu sistemoj dividiĝas al oligarĥio kiel regado de riĉuloj kaj al demokratio kiel regado de malriĉuloj. La tria vojo estus „politea”, en kiu dominas la meza klaso reganta por demokratiaj metodoj kun konservo de idealoj de libereco kaj hierarkia ordo.

Kiel pliŝantanto de la polotiko de „ora mezo” Aristoteles rimarkis en „politea” ŝancon por sociaj kompromisoj kaj relativa stabiligo de politiko.

Ankoraŭ alian sistemon konsidere al politiko prezentis Epikur (341-269). Li propagandis toleron kaj respekton per la ŝtato kaj politikaj konvencioj, kiuj estas utilaj certigante sekurecon, minimumon de moralo, rekurigon de individuo. Vera saĝulo ne pasiĝas tamen pri politiko, ne eniĝas en civitanan servon – ĉar ĉio tio delogas lin de praktikado de virto. Epikura disĉiplo do devas helpi al aŭtoritato, kiam estas minacitaj bazaj valoroj, sed detruiĝi de politikaj intrigoj, aŭtoritato (ordon – povoj), kiam ĝi estas stabila kaj sufiĉe (ne tre bone) funkcias.

Epikura vivmaniero estas poste plurfoje moda (en antika Romo), kaj ankaŭ ofte oni ligis al ĝi (ekz. en utilismo).

Proksimaj al epikurismo estis stioĥistoj (Zenon el Kition, Ĥrizip el Cilicio, Panecius, Polibius, Cicero, Seneka, Markus Aurelius), sed racio estis por ili virto kaj fonto de aŭtonomiar rilato al politiko estis ne egoismo, sed libereco kaj hegemonio de kumvivado kun la leĝoj de naturo. Homoj – kiel kredis stoĥistoj – laŭ naturo estas sociaj individuoj kaj leĝoj de naturo ankaŭ havas karakteron se sociaj normoj. Ŝtata leĝo devas esti konforma al la plej alta leĝo racio.

Valoras rimarki, ke grandaj teorioj ekestas en frua mezepoko, en la periodo de Renesanco kaj Klereco, en duono de XIX jc. kaj komenco de XX jc.

Epokon de grandaj kreintoj de universalaj politikaj teorioj finas principe T. Parsons (1902-1979). Instituciigo de scienco kaj manieroj financi esplorojn instigas al kunaj laboroj. Oni entreprenas esplorojn direktigitajn sur certajn fragmentojn de la kampo de politiko. Inaŭguris ilin Alex de Tocqueville per esploroj pri institucioj de demokratio en Norda Ameriko, kontinuigis Robert Michels kaj Mauric Duvergera en esploroj pri politikaj partioj.



## **Metodologiaj starpunktoj en politologiaj esploroj.**

Socia realeco, en kiu troviĝas scienca laboranto, influas sur rezultojn de esploroj. Politika sinengaĝo kaŭzas efikon – deformantan rezultojn de esploroj. Sue rezultojn de politologioj esploroj havas influon ankaŭ mondkoncepto, konvinkoj valorigantaj, personeco, scipovoj de esperanto. En la kazo de akraj kolizioj inter eksteraj informoj kaj internaj konvinkoj kaj propa sperto homo defendas internajn valorojn, profundajn tavolojn de sia „*mi*”. Sufiĉas pesimisma orientado kaj ekstera situacio de politika malordo, en kiu vivas esploranto, por konkludi pri profundiĝanta „malboniĝo” de politikaj rilatoj, kiuj iam havis perfektan karakteron kaj sekve pli kaj pli degeneris.

Tiam – laŭ Platon – malproksimaj tempoj aperas kiel „*ora epoko*”, post kiuj sekvas „*arĝenta erao*”. Sufiĉas tamen pripensi historion – de larĝiĝanta libereco kaj esprimi sian optimismon, por – kiel John S. Mill – eknegacii tiun metodologian starpunkton.

Bona ekzemplo de influo de personeco kaj politika situacio sur alprenon de metodo de mondrigardo estas vivo kaj verko de Gianbattista Vico. Li vivis en Napolo en la jaroj 1668–1744, kiam la urbo en sortoŝanĝoj transiradis el la manoj de hispanaj Habsburgoj, kies regado ruinigis loĝantaron, sub regadon de Aŭstrio, por fine fariĝi memstara regno sub la scepto de Karol Burbon. G. Vico malsenema post accidente, kiun li havis en infaneco kaj impresiĝema apogadis per siaj traktatoj ĉiun el sekvantaj post si formon de ŝtato. Denaska skeptikismo ordonis al li polemikon kun modaj tiam intelektaj fluoj – karteizianismo kaj atomismo. En rezulto la plej reprezenta lia laboro s.t. „*Scienca nova*” estas esprimo de mem stara intelekto sintezanta propajn spertojn. Laŭ Vico – homaro ripetas en sia disvolviĝo (evoluo) la saman konstantan ciklon, realigante la saman tridividan evoluon skemon, transirante tra tri laŭvicaj stadioj: epokon de dioj, herooj kaj homoj, por sperante falon denove transiri la saman ciklon. Maniero de povopraktikado estas ĉiam tia, kian postulas koncerna momento de historia ciklo. En konvena tempo plenumis sian rolon „*monarkio familia*” sub regado de patriarko de familio. plenumis sian rolon aristokrata faŭdalismo. Necesa estas en historio apero de demokratio, en kiu regado troviĝas en la manoj de plimulto. Necesa estas fine apero de monarkio, en kiu la povo apartenas denove al individuo. Tiamaniere la ciklo de historia cirkulado trakuras de la ŝtato de manko de libereco, tra plena ĝia apliko, al saaŭtoritato de monarĥo. Tiun ĉi lastan li favoris per simpatio, asertante, ke samtempaj al li ŝtatoj strebas al formo de monarkio civilizata – „Kvankam, la ŝtatoj troviĝantaj sur malvarma Nordo, kiel ekzemple Polujo kaj Anglujo, kaj antaŭ cent kvindek jaroj ankaŭ Svedujo kaj Danlando, malgraŭ ke monarkiaj, regas sin tamen per aristokrata sistemo. Se tamen eksterordinaraj kaŭzoj ne perturbos naturan kuron de homaj aferoj., tiuj monarkioj atingos ŝtaton de perfekteco”.<sup>19</sup> Ili ripetos tiamaniere la ciklon, kiun nacioj jam neunufoje trairis.

---

<sup>19</sup> G. Vico, *Nauka nova (Scienca nova)* /en: / Krzemień – Ojak Sław, Vico, Warszawa 1971, s.244–245.

Antaŭvidoj de Vico, almenaŭ rilate al Polujo ne veriĝis, sed la konvinko „*ke ĉio jam estis*” kaj ke „*homaro rekreas siam pasintecon en cikla maniero*” estas ĝis hodiaŭ neunufoje apogopunkto de politologiaj konsideroj.

Dialektita metodo de Hegel, konvinko, ke socia mondo evoluigas pere de kolizioj venkataj per la revolucio, unua krizo XIX jc. de kapitalismo, influis sur la konvinko de Karol Marks, ke socia evoluo trakuras laŭ „*spiralo*”. Socio evoluas premante al progreso ne en rekta linio, sed en multaj kurbiĝoj, ĉar progreso ekestas rezulte de averaĝo de streboj de diversaj sociaj fortoj, kiuj strabante al ŝanĝoj, ofte kvantaj, kontribuas al ŝanĝoj kvalitaj. „*Spiralo*” de evoluo estas tamen ĉe Marks situata tiamaniere, ke elkreskante el komuneco senklasa (primitiva) strebas al komuneco komunista ankaŭ senklasa.


Multaj sciencistoj negacias en siaj esploroj iajn ajn regulecojn de socia evoluo agnoskante ĉefe rolon de hazardo, influanta sur la kuron de politikaj procezoj. Tian econ enhavas i.a. verkoj de Epikur, Hobbes kaj Macchiavelli.

En „*fatum*” – fatalo tute nedivenebla de homoj kredis i.a. Zenon el Kition, fondito de la skolo de stoikistoj, kaj ankaŭ Baruch Spinoza.

Pri neŝanĝo de esto kaj senefikeco de serĉado signojn de evoluo instruis Zenon el Elea (ca. 490 – ca. 430).

Fontoj de politika scio.

Ekkonante objektivan politikan realecon en la procezo de esploro de fontoj ni engaĝas nian scion eksterfontan:




*Desedn.5. Maniero de ekesto de priskribo de politika realeco.*

Politikan fontan scion povas liveri informado pri politiko, t.e. pri faktoj, fenomenoj kaj politikaj procezoj, kune kun ilia ĝenerala konteksto, t.e. kun tio ĉio, kio tiun ĉi informadon transdonas (en teorio de informado – kune kun informa kanalo).

## Metodoj de politologiaj esploroj.

Post pozitivismo restis du antaŭjuĝoj rilate al scienco. La opinio, ke nur tiam esploroj de realeco meritas nomiĝi sciencaj, se priservas sin per metodoj de esploroj de natursciencoj, jam delonge malaktualiĝis kiam montriĝis, ke al esploroj de socia vivo oni ne povas apliki ĉiujn esplor metodojn de natur-fizika mondo. Tamen la dua antaŭjuĝo, ke ĉiu esplora disciplino estas memstara kaj rajtigita, meritas nomiscienca disciplino, se ĝi disponas ne nur pri objekto de esploroj, sed ankaŭ pri sia karakteriza esplormetodo, havas pli daŭran eston. De longe sciencoj sociaj kaj humanistaj profitas al siaj metodologiaj atingajoj ĉar pante reciproke el formigitaj de si metodoj. En la kazo de politologio estas tute pravigitaj ĝia genealogio kaj proksimaj ligoj kun politikaj sciencoj, kiuj estas ĝiaj helpaj sciencoj. Tiu helpeco signifas ne nur neceson adapti iliajn esencajn rezuktojn sed ankaŭ utiligi metodojn, per kiuj oni tiujn rezultojn atingis. Ŝanĝiĝemo kaj multaspekteco de politiko instigas utiligi diversajn metodojn por multflanka scienca rigardo (desegn.6)



*Metodo* estas sistemo de premisoj kaj reguloj permesantaj ordigi praktikan kaj teorian agadon por atingi celon, al kiu konscie oni strebas. Esplora metodo ampleksas tuton de ĝeneralaj premisoj por atingi intencitaj sciencan celon. Metodologio de scienco estas antaŭ ĉio scio pri metodoj de scienca agado kaj aplikataj esplorprocedoj, pri strukturo de sciencaj sistemoj, pri teorioj, konceptoj. Esplortekniko estas difinita procedo ligita kun aplikado de metodo.

*Esplormetodoj* de politologio povas esti klasifikitaj diverse, depende de speco de fontoj, tempo de esploroj kaj trakuro de politikaj procezoj.

Plej ofte aplikas en politologio:

**Analizon sisteman** – oni konsideras David Easton ĝia iniciatinto, sed principe teorion de malfermitaj sistemoj inkluzive kun nokia aparataro ellaboris en 1951j. Talcott Parsons, kaj Easton aplikis tiun metodon al sistemoj politikaj<sup>20</sup>. Analizo sistema devas konsideri 9 ecojn karakterizajn por sistemoj malfermitaj:

- *prenado energion per sistemo al ekstera ĉirkaŭo* – ĉar neniuj socia strukturo estas aŭtarcia. Sistemo politika ĉerpas energion de ekstera ĉirkaŭo, kiu estas sistemo socia.
- *transiro* – sistemoj malfermitaj transformas prenatan energion.
- *eliro* – sistemoj malfermitaj eksportas al ĉirkaŭo karakterizan por si produkton. En la kazo de politika sistemo tio estas decidoj ordonpovaj, konduktoj kaj opinioj (ideoj) politikaj.
- *sistemoj kiel cikloj de okazintaĵoj* – produkto eksportata al medio ebligas aliron al fontoj de energio bezona por ripeti la ciklon de egado. Strukturon de la sistemo kreas okazintaĵoj, ne objektoj (aĵoj), kio antaŭpremis dinamikan karakteron de la strukturkoncepto.
- *negativa entropio* – kondiĉo de transdaŭro de sistemoj estas agado por haltigi procezon de entropio t.e. degrado de energio kaj disperso de strukturo.
- *informaj eniroj* – negativa resenda kluĉado, kodprocezo. Eniroj al malfermitaj sistemoj estas ne nur materialoj energetikaj, sed ili havas ankaŭ informan karakteron kaj liveras signalojn pri medio, propra funkciado, efikoj de agado, postuloj de ŝanĝoj, aŭ apogo. Plej simpla speco de informa eniro estas negativa resenda kluĉado. Ĝi permesas al la sistemo korekti deflankiĝojn de la (kurso) rondiro. Por ke informado estu utila, ĝi devas esti „kodita” t.e. akomodita al la kodo, lingvo, kategorio devigaj en la sistemo.
- *stato stabiligita kaj „homeostazo” dinamika* – prenado energion de ekstere, bremsanta entropion permesas subteni certan stabilecon de energiointerŝanĝo, tial sistemojn malfermitajn karakterizas stato stabila. Tio ne signifas senmovon, ĉar daŭras tie ĉi trafluo de energio kaj eksporto de sistemproduktoj, sed statoj de endanĝerigo kaŭzas aktivigadon de fortoj strebantaj al ekvilibro, disvolvo kaj ekspansio. Strabado al ekvilibro influas sur stabiligon de la sistemo.
- *diferencigo* – sistemoj malfermitaj strabas al diferencigo kaj komplikigo, kio influas sur la fakton, nuntempaj sistemoj karakteriziĝas per alta specializo kaj funkcimulteco.
- *„ekvifinaleco”* – sistemo povas atingi la saman finalecon staton ĉe diversaj komencaj kondiĉoj kaj per diversaj manieroj.

Depende de la objekto de esploroj, ni povas diferencigi analizon:

- *makrosisteman* – kiam ĝi koncernas politikan sistemon kiel tuton,

---

<sup>20</sup> Persons T., The social system, New York, 1951

Easton D., The analysis of political systems /en: Comparative politics, laboro ara. Macrides R.C., Brown B.E. /red/ Homewood, III. 1961 p. 81–94

- *sistemon de mezo vico* – kiam ĝi koncernas iun subsistemon ekz. sistemo partia rilate al sistemo politika,
- *mikrosisteman* – kiam koncernas elementon de la sistemo ekz. konkretan organizon, rilatojn, politikan decidon kpt.

**Metodo decida** – tiu ĉi metodo akiradis popularecon ekde la fino de sepdekaj jaroj, apogata de politologoj amerikaj kaj germanaj. Karakterizon por estas uzado de nacioj:

- *decida centro* – traktata kiel subjekto de politika agado,
- *decida procezo traktata* kiel aro grupo de faktoroj kaŭzaj – efikaj, prenataj tempe, etape, organizataj de decida centro,
- *decido politika* t.e. akto de elekto de politika agado,
- „*implemento*” *politika* t.e. procozo de realigo de decido pere de alprenitaj metodoj kaj rimedoj.

La metodo havas multajn bonajn flankojn kaj mankojn. Avantaĝo estas preno de procezoj en ilia dinamiko kaj kondiĉoj, ebleco sufiĉe bone rekrei faritan decidon en pasinteco. manko estas, ke multaj faktoroj de decida procezo, precipe subjektivaj, surbaze de kiuj estis farita decido, povas ne esti ĉirkaŭprenitaj per esploro.

**Metodo kompara** – estas larĝe konata en scienco. En politologio oni povas kompari funkciajn en politika vivo objektojn. Ili povas esti institucioj, sistemoj, konvencioj politikaj, kies ecojn ni deziras ekkoni per komparo.

Materialo kolektita en la procezo de sciencaj komparoj servas al trispeca celo: liveras eblecojn de pluaj esploroj, favoras optimigi decidojn, ludas gravan rolon en formigado de konscio politika de individuoj kaj grupoj sociaj. Komparaj donitaĵoj gvidas decidantojn sur ĝustan solvon en procezo de politika decidofarado. Kun granda forto ili alvenas al homoj per objektiva enhavo, do ili povas havi influon sur politikajn konvinkojn de civitanoj.

**Metodoj behavioraj** – oni aplikas ilin en politologio al esploroj de politikaj kondutoj (ang. behaviour – konduto). Ili bezonas sue ellaboritaj sociologio teknikoj de fenomenanalizo. Oni ekkonas tiujn fenomenojn per konduto de individuoj, aro de individuoj. Per tiuj metodoj ni povas ankaŭ esplori motivigon de kondutoj, opinioj, do faktorojn psikologiajn kaj ideologiajn de agado en la sfero de politiko.

En behavioraj metodoj ni diferencigas:


- *observadon* – konsidere pri maniero de observado ni diferencigas observadojn: senperan kaj peran, kontrolatan kaj nekontrolatan, malkaŝiatn kaj kaŝitan. Observado partoprenanta estas ekzemplo de senpera observado, kiam esploranto faras ĝin el pozicio de partoprenanto de esplorata grupo aŭ medio. Ĉe observado pera esploranto ne partoprenas en kolektado de indikoj (informoj), sed utiligas indikojn troviĝantaj en raportoj, dokumentoj ktp. Observado

kontrolata estas farata surbaze de sistenatigaj iloj, tiaj kiel demandaroj, skemoj, normoj; oni nomas ĝin ankaŭ instrumentalizita. Nekontrolata observado okazas sen tiuj instrumentoj, sed ĝi estas planita kaj cела. Dum malkaŝita observado esplorataj personoj scias, ke ili estas objekto de esploraj interesiĝoj. Pro tio ili povas kondukti neaŭtentike. Oni evitas tion aplikante observadon kaŝitan; ĝi ne ĝenas observatojn,

- *esplorojn enketajn kaj per intervjuoj*,
- *statistikajn esplorojn de politika aktiveco* – kiel parto de kvanta analizo ĝi preparas indikojn en formo de tabeloj, bildigante ekzemple rezultojn de elektoj (balotado), el kio oni konjektas pri ligoj inter konduktoj kaj sociaj ecoj de la socio. Ofte oni prezentas indikojn pri tio en grafika formo,
- *eksperimentojn laboratoriajn* – metodo de eksperimento havas multon komunan kun *metodo modelo-simulada*. Baza elirpunkto metodologia ĉe ĝia apliko estas konstruo de modelo, kiun oni subigas poste al simulado t.e. agadoj imitantaj / simulantaj realajn sociajn procezojn. El la konduto de la modelo oni konjektas pri politika realeco. Ĉe apliko de komputiloj modelo havas karakteron matematikan. Simuladmodeloj povas konsisti el vortoj, nombro konstruicioj kaj personoj. Lige kun tio oni povas fari simuladon:
  - ekskluzive kun partopreno de homoj (*all-man*) – tiam ĝi ruliĝas kiel ludo aŭ ekzerco (*exercise and games*),
  - ekskluzive kun uzo de komputilo (*all-computer*),
  - kun partopreno de homo kaj maŝino (*man-machine*).

Ŝajnas, ke ekzistas kondĉoj por krei specifan por politologio metodon, kiun ni nomas – *politologia analizo de faktoj*.

Sistemoj ne estas tie ĉi objekto, kiuj subiĝas al esplorproceduro. En unuaj etapoj esploranto devas fari lorn bibliografiajn studojn kaj kolekti fontojn, de dua flanko li devas el politika realeco apartigi fakton el la politikaj procezo kaj fenomeno. Oni starigas hipotezojn rilate al esplora problemo, kiuj elfluas el menciitaj studoj, kaj pli ĝuste el scio eksterfonta. Hipotezoj subiĝas al revizio dum logika kaj esenca kritiko de fontoj, efike de kio aperas aserto de diagnostika aŭ prognostika tipoj. Tiuj sekve asertoj estas denove reviziataj dum la procezo de ĉiuflanka pririgardo (analizo) de la flanko. Kompreno ĝin, esploro de rolo en trakuro de eventoj, difino de signifo por estonteco ktp. permesas teorie ĝeneraligi, priskribi kaj formuli prognozon (desegn.7).



Desegn.7. procedo dum la metodo de analizo de faktoj.

**Funkcioj de politologio.** Tasko de scienco estas krei produkti scion. Pri funkcioj de politika sci oni diris pli supre multe. Sendepende de tio tamen, en literaturo oni indikas sur la funkciojn de politologio (scienco pri politiko), diferencigante plej ofte:

- *funkcion priskriban,*
- *eksplikantan,*
- *antaŭvidantan (prognostikan),*
- *instrumentalan.*

## DEMANDOJ, SKRIBAJ TASKOJ

Precizigu la terminaron: scienco pri politiko, kulturpolitiko.

Skize priparolu la historion de evoluo de ambaŭ sciencoj.

Kial oni traktas la politologion kiel enkondukon al eŭrologio ĉu ĵurnalistiko

kaj la kulturpolikon kiel bildigon de ĉiam aktualaj ŝanĝoj ?